NATIONALBIBLIOTHEK
Zeitschriftensaal

NATIONALBIBLIOTHEK

6-a Jaro. N-o 261 APERAS S.A.T. SEMAJNE 3. Oktobro 1929

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e Gvidanto: E. Lanti	SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris-20e	ADMINISTREJO: Kolmstr. 1, Leipzig O 27 Administranto: R. Lerhner

Eldon-industrio kaj legemo en Japanio

Laŭ statistiko farita en 1927, Japanio, en libroeldona afero, okupas la trian pozicion de la mondo. La tendenco aperinta ĉi tie de kelkaj jaroj, estas precipe notinda.

Konsekvence de l' popola edukado, kiu rimarkeble plialtigis la kulturan vivon de l' japanoj, la bezono por libroj ĉiam pli kaj pli grandiĝis. Tiun emon akravide utiligis al si "Kaizoŝa", unu el la plej entreprenemaj eldonejoj en Japanio. En la fino de 1926 reklamoj por "La Kompleta Kolekto de Moderna Japana Literaturo" sinsekve aperadis en preskaŭ ĉiuj influplenaj ĵurnaloj de la lando. Surĵurnalaj reklamoj ordinare en Japanio okupas pli grandan spacon ol en Eŭropo aŭ Usono. Sed ĉi-okaze ili estis tiel vastaj, ke ili plenigis unu tutan paĝon aŭ eĉ du paĝojn de l' ĵurnalo.

Da similaj serioj literaturaj ni jam ĝis tiam havis sufiĉe multe en malpli granda skalo. Tamen iliaj prezoj estis tro karaj, por ke ili estu legataj de l' amasoj. Nun la afero montriĝis tute alia. Nur por unu jeno (malpli ol 0.50 dol.) oni povas havi ĉiumonate dikan volumon, kiu konsistas el 500—800 paĝoj dense presitaj. Sekve la nombro da abonantoj atingis la monstran ciferon de 330 mil. La plej mireginda rekordo, kiun japana libroeldona rondo ĝis nun atingis!

Eldonistoj por la unua fojo konvinkiĝis, ke la japana leganta publiko jam multege pli grandiĝis ol ili taksis. Instigite de la fakto, similaj eldonprojektoj laŭvice publikiĝis: "Kompleta Kolekto de Universala Literaturo", "Kompleta Kolekto de Japanaj Dramoj", "Kompleta Kolekto de Infanliteraturo", "Kompleta Kolekto de Proleta Literaturo Tutmonda", ktp. ktp.

Ne nur en la kampo de l' beletristiko tio okazis; la modo tuj eniris ankaŭ la sferon de l' sociscienco. Jen ekzemple grandiozaj anoncoj por la eldono de "La Kompleta Verkaro de K. Marks kaj F. Engels", samtempe publikigitaj de du eldonejoj. Furioza konkurenco okazis inter la eldonistoj, por ke unu el ili venku la alian. Kaj efektive unu el ili estis venkita tiel perfekte, ke li devis rezigni la entreprenon malgraŭ multege da elspezoj por longedaŭra reklamado. Onidire la venkinta eldonejo akiris 100 mil abonantojn. Kia ironio, ke la verkaro de la du grandaj revoluciuloj, kiuj donis sian tutan vivon por forigi la kapitalismon de la mondo, estas metata nun en la merkato de "La Oriento" kiel komercaĵo, kiu donos nekalkuleblan profiton al kapitalistoj-eldonistoj!

Nun la japana legantaro jam estas enuigita pro troa abundo da "unu-jena libraro", kaj ne plu montras la iaman entuziasmon rilate al tiuj eldonoj, kiom ajn sensaciajn frazojn la aferistoj uzas. Por konservi la profitegon por ĉiam, aŭ almenaŭ ne malmultigi ĝin, kiun donis la favora situacio al la eldonistoj, ili ĉiel klopodas trovi rimedon, kiu forte incitos la aĉetovolon de l' publiko. Vulgara, tamen plej efikplena metodo estas, ke oni pli malaltigu la prezon. Tiele lastatempe, 50-sen-a (t. e. ½-a jena) serio da libroj anstataŭis la unu-jenan.

Multe da eŭropanoj ankoraŭ pensus, ke japanoj havas tre malmulte da scio pri eŭropa literaturo. Granda eraro. Klasikuloj kaj modernuloj, preskaŭ ĉiuj reprezentantaj ilin verkoj jam estas tradukitaj japanlingven. Ĉi momente kompletaj verkaroj de L. Tolstoj kaj M. Gorki estas liverataj kiel tiuj el malkaraj serioj, ĉar precipe la verkoj de Gorki vekas profundan intereson ĉe la rapidege kreskanta legantaro, kiu postulas akran klaskonscion en literaturo.

El la supre priskribitaj faktoj oni facile povas konstati, ke la libroeldona afero en Japanio jam plene submetiĝis sub kapitalisma regado, ĉar sen ia granda kvanto da kapitalo, neniel povas efektiviĝi tiaj grandskalaj entreprenoj. Mezgrandaj eldonejoj multope bankrotis, aŭ ili vegetas, malgraŭ ke la libroj eldonitaj de ili ofte estis tre utilaj por la publiko. La kapitalo pli kaj pli enruliĝas la manojn de kelkaj potencaj eldonistoj, kiuj metas nur sian kulturan karieron je monakirado.

La vivo de japanaj literaturistoj kompreneble estas influata de la tendenco, kiu pli kaj pli fortiĝas en eldonaj rondoj ĝenerale. Ĝis antaŭ nelonge en Japanio aktoroj el ĉiuj artistoj kondukis aparte luksan vivtenon, dum literaturistoj ĉiam suferis pro mondeficito. Nun la afero tute aliiĝis. Kelkaj popularaj romanistoj jam pasigas ege luksan vivon, same kiel eminentaj aktoroj, ĉar iliaj verkoj estas eldonataj tiom grandkvante, ke ili donas al ili saman enspezon kiel al la lastaj.

Tia stato tamen estas escepto. La vivnivelo de multaj literaturistoj male pli malaltiĝis, ĉar potencaj eldonistoj bonakceptas nur tiajn verkistojn, kiuj donas al ili grandan profiton, kaj la gazetoj modestaj, kiuj longe subtenis ilian vivon, unu post la alia formortis, ne povante kontraŭstari al la atakado de giganta kapitalo. Bungeika Kjokai, la plej granda sindikato literaturista en Japanio, raportis ĉi-jare, ke 2/3 el la membroj de l' asocio jam ne tenas sian vivon per verkado.

Tiaj cirkonstancoj neeviteble incitas seriozan konsideron de sentemaj literaturistoj pri la kontraŭdiroj kuŝantaj en la nuna sociordo. Proleta literaturo, kiu ekburĝonis en la lando antaŭ ĉirkaŭ dek jaroj, nun faris okulfrapan progreson. Laboristoj kaj intelektuloj plej progresemaj, jam enuigitaj de l' dekadenca literaturo burĝa, sin turnas pli kaj pli al proleta literaturo, kiu senkompate kritikas la socian vivon sub kapitalisma sistemo. Ni jam havas kelke da tre eminentaj verkoj tiaspecaj. Pli detale pri ili mi skribos en proksima okazo.

R. Kiyomi (13 893), Tokio.

701820-D 6 H 1929-IV

KIO OKAZAS EN ITALIO?

Kiel fartas la "Korporativa Ŝtato" en Italio, kiu komplete reguligas la prezon, la salajron, labordaŭron, la nombron el laboristoj en ĉiu entrepreno kaj la administradon de l' industrio? Kiam la itala infano ricevas sian nomon, la Korporativa Ŝtato rajtas malaprobi kaj ŝanĝi, se ekzemple la gepatroj volas honori la memoron de liberalulo. La viro, kiu je la 25-a jaro restas fraŭlo, devas pagi specialan imposton kaj se li edziĝas, la K. Ŝ. postulas, ke li produktu infanojn. La lernejo preparas marionetojn. Konfideme Musolini rigardas al la 297 685 knaboj (15-jaraj kaj pliaĝaj), nomataj Avangarduloj, kaj al la 461 815 knaboj (sub la 15-a jaro) — la Balillanoj.



Faŝisto povas mortigi senpune, sed la estro de la Katolika Partio devas resti kvar jarojn en malliberejo, nur pro "lia intenco atingi kaj transiri la landlimon". La 20 mil oficiroj en la milicio malamas demokration kaj sonĝas pri ekspansio de la Itala Imperio, kaj viro restas nun en la arme - rezervo ĝis sia 55-a jaro anstataŭ la 39-a kiel antaŭe.

La parlamentanoj unue estas elektataj de la Kapital-Labor-sindikatoj; poste 400 kandidatoj sume estas konfirmataj de la Nacia Ĉefa Faŝista Konsilantaro. Tiam la voĉdonantoj devas akcepti aŭ malakcepti la tutan liston kaj danĝere estas voĉdoni per "ne" pri ĝi. Ĉu mirinde, ke en printempo de l' jaro 1929 Musolini ricevis sukceson en la elektado laŭ tiu nova maniero?

La faŝisma Italio ŝuldas al Usono (aŭ pli vere — al usonaj bankistoj) 400 milionojn da dolaroj kaj pagas 7% por la prunto. Tial la usonaj ĵurnaloj ne kritikas la faŝismon, pro tiu ĉi usona hipoteko. Plensignife en februaro kaj junio 1929 la alilandaj bankistoj ne respondis al la alvoko prunti monon por la plano regajni 20 mil kvadrat-kilometrojn da tero en Suda Italio, Sardinio kaj Sicilio.

Laborleĝoj kaj laborkondiĉoj

Laŭleĝe entreprenistoj, kiuj lokaŭtis sian laboristaron por eviti la observon al la oficiala laborkontrakto, estas monpunataj kaj malliberigataj. Sed fakte ĝis nun neniu entreprenisto suferis punon. Tri aŭ pli da gelaboristoj, kiuj strikas aŭ ĉesigas laboron, povas ricevi 3 monatojn da malliberigo kaj iliaj estroj 12 ĝis 24 monatojn krom monpuno de 80 ĝis 125 dolaroj. Multe da strikintoj jam tiel puniĝis. La entreprenistoj ĉiam plendas pro tro altaj salajroj al siaj dungitoj, kaj en junio Musolini anoncis malaltigon. En Turino kaj en la tiea metal-industrio la salajroj estas plej altaj. Jen la tieaj salajroj esprimitaj en usonaj cendoj kaj pohore:

Specialistoj	17½
Kvalifikitaj	13¾
Maŝin-priservantoj	12¼
Manlaboristoj	11¼
Lernantoj	8
Virinoj	8½
Knaboj sub 16-a jaro	4½

El tiu salajro la laboristo devas pagi 3% por asekuro kontraŭ maljuneco kaj



5% kiel enspez-imposton. La kvalifikita laboristo ricevas semajne nur dol. 7.75. Se la edzino kaj unu filo perlaboras 65 lirojn, la tuta familio ricevas 220 lirojn (11 dol.), sed necesas almenaŭ 195 liroj por aĉeti nur nutraĵon kaj loĝejon. Per la restantaj 25 liroj la italo devas provizi vestaĵon, karbon, instruon ktp. Laŭ senpartieca enketo dum jaroj 1905 ĝis 1915 la laboristoj en la nordaj urboj fartis pli bone ol nun. Tamen la entreprenisto ankoraŭ postulas plian malaltigon de la salajro.

Musolini, papo kaj faŝ. sindikatoj

Krom la kreo de "Korporativa Ŝtato" (maldika mantelo por kovri diktatorecon de Musolini) la faŝisto fieras nun pri la "Konkordato" (interkonsento) kun la papo. En Sud-Italio oni diras: "Ja la papo venkis. Pio XI. sukcesis fini interbatalon, kiu daŭris preskaŭ 60 jarojn." Kontraŭe en Nord-Italio oni aŭdas, ke Musolini venkis en la afero, ĉar li ankoraŭ regas la edukadon. "Tiu, kiu posedas la junularon, posedas la estonton." Nur dum 2—3 horoj semajne la preĝistoj povas instrui sian katekismon sub severa faŝista observo. Kredeble nun la preĝisto helpos silentigi la kreskantan plendadon eĉ de la laboristoj en la faŝista sindikataro! (Tia plendado ekzemple okazis ĉe Kongreso de Faŝistaj Sindikatoj, je 30. junio kaj estis priraportata en "Il Lavoro Fascista".)

Eble la Eklezio helpos la Faŝistan Grandan Konsilantaron elekti novan "Duce", kiam Musolini mortos kaj liaj samtempuloj interbatalos pro la estreco.

Faŝista demagogio

En duon-oficiala respondo al la kritikoj aperintaj en "World" (Novjorko) E. Korzi (Corsi) diris defende, ke Musolini nur oratoras retorike pri celo de l' itala imperialismo, sed kontraŭe agas. La itala laboristo perlaboras nur 11 dolarojn semajne, ĉar Italio estas ekonomie tre malriĉa lando. Korzi diras, ke laŭleĝe ekzistas la limigita labortago de ok horoj kaj minimuma salajro. Atako kontraŭ analfabeteco, konstruado de novaj domoj (por 80 mil familioj ekz. en Romo mem), de pontoj, vojoj, lernejoj ktp. efektiviĝas. Korzi opinias, ke post "Il Duce" venos la regado de l' Faŝisma Sindikatismo per la du milionoj da organizitaj laboristoj. Iom post iom en la eksperimento la fera manpremo de la diktatoreco malfortiĝos.



Konkludoj pri la nuna situacio

Jen Italio vidata tra neŭtralaj kaj oficialaj okulvitroj. Tie en neevoluinta lando krizo okazis. La laboristaro ne sufiĉe maturiĝis por akiri la povon. Hejmvenintaj soldatoj, oficiroj, kiuj ankoraŭ volas ordoni, naciemuloj, senpripensaj junuloj unuiĝis en la faŝismo sub estreco de la renegato, la ambiciema Musolini. La faŝismo sukcesis per helpo de la kapitalisto, kiu pagis por restarigi "leĝon kaj ordon" kaj per helpo de usonaj bankistoj, kiuj hejme perforte kutimis subpremi "la ruĝulojn". Kontraŭstarantoj estis buĉataj aŭ devis rifuĝi alilanden. Sindikatojn oni detruis, same la kooperativojn. La lernejo ĝis la universitato fariĝis dresejo, papagejo. Libereco fariĝis ĉiam pli pala fantomo kaj fine elmigranto. La monarĥo jam estis senpova pupo, sed necesis fine la beno de la papo por la faŝista reĝimo.

Ĉu ne vere la vojo staras nebarita, kondukante al senstrika, senklasa socio, kiu revivigos la gloron de la antikva Roma Imperio? Vana sonĝo. Al Italio mankas la karbo, la nafto, la fero. Bankistoj helpas, sed poste postulas insiste sian altan procenton. Kiel trovi la monon? Imposto, malalta salajro agitas la laboriston. La kapitalisto ne volas pagi plue. La ŝajne entombigita klasbatalo denove reaperos. La subpremita volo de la popolo denove respektigos sin. La itala laboristaro fine

Oni armas en Aŭstrio por ŝtata renverso!

La "Hejmland"-faŝistoj anoncas siajn planojn

Tute libere kaj senĝene armas la burĝoj por la faŝista ŝtat-renverso. Mi montru ekzemplon, citante el ĉefartikolo aperinta en la organo de l' hejm-defendantoj (faŝistoj): "Heimatschutz-Zeitung". Tie oni legas sub la malkaŝa titolo "Ŝtata Renverso": Ĉu nun la konstitucio estu rompita? Ĉu okazu ŝtata renverso kaj diktatoreco? La deklarita konstitucio en sia leĝa formo estas malsaĝaĵo. Tial la intelekto kaj vivinstinkto de l' popolo postulas ĝian forigon. La antikvaj romanoj vivis en politika matureco kaj estis la plej feliĉa nacio en tutmondo. Ili ankaŭ donacis al si konstitucion. Spite tio ili estis bonaj respublikanoj. En la krizaj danĝeraj tempoj alfluis la tuta ŝtata potenco al unu viro. Ne la senatanoj, sed la diktatoro savis la Roman Ŝtaton el la danĝero, en kiu ĝi troviĝis. Tial ni ne timu, se oni riproĉas al ni, ke ni volas la ŝtat-renverson. Ni ne parolas multe pri la ŝtata renverso; sed ni volonte deklaras, ke por la aŭstria ŝtato nuntempe ne estas evitebla ŝtata renverso. Sen tiu radikala operacio Aŭstrio ne saniĝos. La sidejo de l' malbona Spirito, tie, kie ĝi firme sidas, devas esti ventumata. Pri tiu ĉi vidpunkto centmil aŭstrianoj konsentas, kiuj ekatendas en la "hejm-defenda movado". Ni ne bezonas murmuri pri tio en kaŝejo.

La hejm-defendantoj povas libere eldiri: "Ni volas la potencon en la ŝtato, por ke ni povu purigi tiun ĉi ŝtaton kaj fari el ĝi agrablan loĝejon. Ni jam antaŭanoncas tiun postulon al la kompetentuloj, kaj rimarkigas, ke tiu ĉi postulo estis plene akceptita. La hejm-defendantoj depost sia ekzisto neniam kontraŭstaris al la ŝtata konstitucio. Sed ili devas pro sia aga historio: sia ekzisto, formiĝo kaj viv-elmontro, renversi la nunan ŝtatan reĝimon. En multaj aŭstriaj Liglandoj iliaj grupoj jam nun estas akceptataj kaj konsiderataj kiel leĝaj polic-helpantoj.

"La hejm-defendantoj ne batalas kontraŭ la ŝtata konstitucio. Ili respektas leĝojn, kiuj estas necesaj por la ŝtata ordo. Sed ili malamas nur tiujn leĝojn, kiuj kreas nur malordon kaj multobligas konfuzon, kiuj montris sin maltaŭgaj por regado kaj gvidado de Aŭstrio. Tiun ĉi falsan rebrilon ili volus detrui! Pro tio nenia marŝado al Vieno estas bezonata. Necesas nur, ke la viroj el la Hejmdefenda Ligo prenu en la manojn la direktilon, kiam la parlamenta maniero ne plu kapablas direkti. Oni ne povas konsili, ke ili hezitu en la decida momento. Se oni volus rifuzi tion, kompreneble poste povos naskiĝi popola movado por ni favora, bruega uragano! Uragano kontraŭ politikuloj kaj partioj, kiuj sin enfermas kontraŭ la necesego: ili devas esti forblovegataj! Ĉu oni povas esti certa, ke ili ne faris sub la masko de severa leĝo perfidon kontraŭ la plej altaj havaĵoj de la nacio? Ĝis nun oni ne sufiĉe komprenis, kion diris d-ro Ŝtajdle en sia lasta parolado pri la senco de ŝtata memhelpo. Se tiu memhelpo ne funkcias per la ordinara vojo, devas esti surpaŝataj eksterordinaraj vojoj. Se oni volas nomi tion



ŝtata renverso, tio por ni nenion signifas. La ĉefaĵo estas, ke la vojo konduku al la celo. Ni rememoras kun ia emocio pri la tempo, en kiu ekzistis fakte nur unu konstitucia paragrafo (Rim. de l' verk.: Aludo al la par. 14 en la monarkia leĝaro): Per ĝia helpo la ŝtataj kaj popolaj bezonoj povis esti kontentigataj, ankaŭ en tiu momento, en kiu la parlamento malfunkciis. La ŝtatrenverso en Aŭstrio ne signifas perforton al la popola volo, sed liberigon de la parlamento, kies spiriton la demokratio perfortas. Ni volas disŝiron de multpartia ŝtato, disrompon de la ne plu eltenebla diktatoreco de Ruĝa malplimulto . . ."

La minaco per diktatoreco en tiu kaj similaj artikoloj en la burĝaj ĵurnaloj ree montras al ni okulfrape la ekzemplojn de Italio, Hungario, Polio kaj Jugoslavio. Sajpel (Seipel) mem, la ekskanceliero, aludas pri tio, kaj ankaŭ en alia burĝa gazeto ni legas: "Aŭ la socialdemokrataj gvidantoj flankenmetas la partiajn interesojn kaj respektas la ŝtat-interesojn. Aŭ, aliokaze, ilia fatalo estos plenumita, kaj ili estos forblovataj, kiel en Italio, Hungario, Polio kaj Jugoslavio." Tiuj ĉi minacoj rilatas ĉefe la laboristajn amasojn, kiuj neniel volas submetiĝi sub la faŝismon, je nenia kondiĉo.

La hejm-defenda armado dume progresas. Per ĉiuj rimedoj de teroro, per subaĉeto, korupto kaj demagogio la faŝistoj nun starigas fervojistan kompanion. La faŝistaj sangaj bestoj volas komenci la batalon. Vivo kaj sorto de l' laboristaro estas en granda danĝero. Kaj iliaj edzinoj kaj infanoj en tiu decida momento rigardas al prelato Sajpel kiel servisto de dio sur la tero. Ĉu li plenumu la volon de Kristo, kiu predikis al la homoj: Ne mortigu!? Sed lia tera eminenta prelata servisto Sajpel predikas en lia nomo la malon: Mortigu! En la nomo de l' ŝtat-kapitalista sociordo!

Tiu granda findecida batalo en Aŭstrio nun komenciĝas. Ni nun devas koncentrigi ĉiujn niajn fortojn, por ke ĉiuj ŝtat-renversaj planoj de l' faŝistoj disrompiĝu kontraŭ la fera muro de l' laboristara kontraŭstaro!

Knourek (2474).

---

vekiĝos kaj kune agos kun la laboristoj el tutmondo por administri mondskale la industrion. La inkuboj de faŝismo kaj naciismo malaperu. (488[1])

[1] La informoj ĉi tie kompilitaj plejparte aperis en serioj de gravaj artikoloj en "Times" (Tempo), Londono, kaj "World" (Mondo), Novjorko, dum junio 1929.

KIO ESTAS LA IWW?

MALKAŜEMA KLARIGO PRI ĜIAJ PRINCIPOJ, CELOJ KAJ METODOJ

(1-a daŭrigo. Vidu antaŭan n-on)

10 000 enkarcerigitoj

Se ni publikigus la nomojn de ĉiuj IWW-anoj, kiujn oni enkarcerigis de la tempo de ĝia komenco, ni plenigus libron tiel grandan kiel la telefon-adresaro de granda urbo. Oni enkarcerigis pli ol mil anojn dum la liberparol-bataloj, kiujn la IWW devis entrepreni volenevole en diversaj partoj de la lando. Oni arestis ĉirkaŭe 900 anojn dum la teksa striko en Lorens (Lawrence, Mass), dum 1912. Ĉirkaŭ 100 anojn pli poste en Litl Fols (Little Falls), en la ŝtato Novjorko. Dum la teks-striko ĉe Peterz'n (Paterson, N. J.), oni malliberigis 1800 anojn. En la jaro 1917 oni elportis perforte el Bizbi (Bisbee, Arizona), 1184 virojn, precipe IWW-anojn, kaj gardis ilin en fostfortikaĵo dum kelkaj monatoj sen ia ajn leĝprocedo. Oni ĵetis en la karcerojn milojn da anoj de la "Western Federation of Miners" (Okcidenta Federacio de Ministoj), dum tiu organizo estis parto de la IWW. Dum 1920 kompiliĝis parta listo el anoj enkarcerigitaj depost la komenco de la milito. Tiu listo montris 1327 nomojn. De tiu tempo restis daŭra fluo de niaj anoj tra la karcerpordoj. Nur last-tempe oni arestis 450 IWW-anojn en Portland, Oregon, sen ia motivo laŭleĝa. Ankoraŭ nuntempe estas ĉ. 200 viroj malantaŭ la muroj, kelkaj el ili por sklaviĝi la tutan vivon tie, aliaj estas kondamnitaj je 5, 10, 15 aŭ 20 jaroj da punlaboro en la pundomoj — tute nur pro siaj agadoj en la IWW. La tuta nombro da IWW-anoj enkarcerigitaj depost la jaro 1905 estas pli ol 10 000.

Ekster la socia palisaro

Dudekon, aŭ pli multe, da IWW-anoj fimortigis niaj malamikoj kaj iliaj dungitoj. Krom tiuj ĉi pli grandaj krimoj kontraŭ niaj anoj estas sennombraj aliaj krimoj, kiujn oni faris kontraŭ nin, aŭ je la nomo de "law and order" (leĝo kaj ordo) aŭ sen oficiala permeso.

Oni gudrumis kaj plumumis IWW-anojn — tiu ĉi kruela kriminsultego konsistas el tio, meti varmegan gudron kaj plumojn sur la nudan korpon de la

viktimo —, batis ilin, rifuzis al ili civitanecon, ekzilis ilin, invadis iliajn domojn, prenis iliajn dokumentojn, neis iliajn leĝajn defendrajtojn, surmetis al ili tro karan kaŭcion, submetis ilin al servuto, forportis ilin, submetis ilin al kruela kaj neordinara puno, nejuste akuzis ilin, eksterordinare alte monpunis ilin, gardis ilin en malliberejo sen juĝado ĝis la morto, frenezigis ilin per persekutado, rifuzis al ili la rajton uzi la poŝton, rifuzis al ili la pres-, parol- kaj kunvenrajtojn, kaj ĉiujn aliajn rajtojn garantiitajn de la Konstitucio.

Oni estas rifuzinta al IWW-anoj la rajtojn proklamitajn de la Deklaro de Sendependeco: la vivon, la liberon kaj la serĉadon je feliĉo.

La salonegojn, oficejojn, kaj ĉefsidejojn oni atakis sen ia laŭleĝa rajto. Oni prenis, aŭ detruis, la librojn, broŝurojn, poŝtmarkojn, presaĵojn kaj oficmeblaron de la IWW.

IWW transdaŭras, ĉar ĝi restas sur la bazo de ekonomia neceso

Estas facile kompreneble, ke nur gehomoj de kuraĝo kaj konvinko volonte aniĝos al tia organizo. Sed la plimulto ne aniĝas libervole. Ili estas pelitaj en ĝin de malsato, suferado, malriĉeco, mizero kaj malespero, ĝuste tiel kiel la river-bordoj estas forportitaj de la torenta rivero, al la maro. La torenta rivero de disfalanta kapitalismo liveras la membraron al la IWW.

Tiel la terura persekutado malsukcesis je sia provo subpremi aŭ estingi la IWW-organizon. Male, niaj instruoj disvastiĝas kiel stepfajro, kiun nek sango nek perforto povas estingi. Por ĉiu cento da anoj enkarcerigitaj, miloj antaŭenpaŝas por aniĝi kaj kuraĝigi per sia ĉeestado tiujn, kiuj estas batalantaj.

Tiu ĉi fakto mem, ŝajnas al ni, devus montri al la ekstera mondo, ke estas g r a n d a n a t u r a f o r t o s u b t e n a n t a t i u n ĉ i m o v a d o n, kaj ke estas tiom stulte persekuti nin, kiom por Kserkses, reĝo de Persio, ordoni siajn soldatojn, ke ili vipu la ondojn de la maro, por ke ili trankviliĝu kaj lasu pasi lian armeon. Tiu ĉi natura forto, e k o n o m i a n e c e s o, donas al nia movado intelektan kaj moralan povon, kiun neniu pendigilo povas mortigi, neniu karcero venki. Eĉ la plej bigota ulo inter niaj malamikoj devas kompreni, ke, por travivi tian teruran severan elprovon, nia organizo devas havi malantaŭ si fundamentan veron, kiun oni ne povas senpune ignori, sed kiun oni devas esplori. La popolo akceptas niajn principojn kiel evangelion spite ĉia persona danĝero al si mem. Kiaj mirindaj principoj tiuj ĉi povas esti? Ili esprimiĝas en la Antaŭrimarkigo al nia Statuto kaj prezentiĝas jene:

III. Bazaj principoj de la IWW

La laborista klaso kaj la dunganta klaso havas nenion komunan. Ne povas esti paco, dum malsato kaj bezono ekzistas inter la multaj milionoj da laboristoj, kaj la malmultuloj, kiuj estas la dunganta klaso, havas ĉiujn bonojn de la vivo.

Inter tiuj ĉi du klasoj batalo devas daŭradi, ĝis la laboristoj de la mondo organiziĝos kiel klaso, alproprigos al si la teron kaj la produkteman maŝinaron kaj forigos la salajran sistemon.

Ni trovas, ke la koncentriĝo de la administrado ĉe la industrioj en ĉiam malpli multajn manojn faras la metiajn unuiĝojn nekapablaj sukcese konkuri kun la ĉiam kreskanta povo de la dunganta klaso. La metiaj unuiĝoj kuraĝigas al stato de l' aferoj, kiu permesas al unu parto de la laboristaro kontraŭstari alian en la sama industrio, tiel helpante venki unu la alian reciproke en la salajraj bataloj. Plie, la metiaj unuiĝoj helpas la dungantan klason trompi la laboristojn kredigante, ke la laborista klaso havas interesojn komunajn kun la dungantoj.

Oni povas ŝanĝi tiujn kondiĉojn kaj subteni la interesojn de la laborista klaso sole per organizo formita tiel, ke ĉiuj ĝiaj anoj en unu industrio, aŭ en ĉiuj industrioj se necese, ĉesos labori, kiam ajn oni anoncos strikon, aŭ mastrostrikon (lokaŭton) en iu fako. Tiel farante difekton al unu, oni faras difekton al ĉiuj.

Anstataŭ la konservema moto: "Justan tag-salajron por justa tago de laboro", ni devas surskribi sur nia flago la revolucian signaldiron: "Forigo de la salajra sistemo".

Estas la historia misio de la laborista klaso forigi la kapitalismon. La produktula armeo devas organiziĝi, ne nur por la ĉiutaga batalo kun la kapitalistoj, sed ankaŭ por daŭrigi la produktadon, kiam la kapitalismo estos renversita.

Organizante nin industrie ni estas formantaj la strukturon de la nova socio en la ŝelo de la malnova.

IV. La celo de la IWW

Laŭ tiu ĉi deklaro de principoj la IWW proponas organizi ĉiujn produktemajn homajn fortojn, en tiu ĉi[1] kaj, fine, en aliaj landoj, t. e. ĉiujn laboristojn manajn kaj cerbajn, i n d u s t r i e, en Industriajn Unuiĝojn, Industriajn Unuiĝajn Filiojn en la laborejoj, kaj Industriajn Konsilantarojn. Pli poste ni nomos la ĉefajn fakojn de la nova asocio, kiun ni proponas organizi.

Tradukis SAT-ano 1781

laŭ 3-a reviziita eldono de broŝuro samtitola publikigita de IWW., 555 W. Lake St., Chicago, Ill., Usono.

(Daŭrigota.)

[1] Usono. — L a t r a d.

TERORO

Teroro! Pro ĉi tiu vorto ektremas la koro de pacema filistro kaj malvarmo trakuras lian dorson. Ekaperas en lia imago ia monstro de anarĥio revolucia, vestita en purpura ruĝo, kiu renversante ĉiujn "leĝajn ordojn", senescepte hekatombas milojn da pacemaj civitanoj. — Estas ja speciala, bone kaj ruze preparita, diligente, celkonscie direktata tendenco, ke sub la formo de teroro aperu kiel sangavida monstro, la proletaro mem.

Sed, — en la historio de socievoluo la teroro aperas kiel rimedo de klasaj bataloj. Karl Marks, kiu klare difinis la naturleĝojn de klasbataloj per la materialismo, konstatis por la socia revolucio, kiel neeviteblan garantiilon de venko, kiel plej efikan metodon de liberiĝo el la katenoj de reganta sociordo, la proletaran diktatorecon. La vorto — diktatoreco ja enhavas la subsencon de perforto, kies koncepto kondukas al la teroro. Kaj tiun malkaŝan konstaton de teroro la reganta klaso klopodas eluzi, starigante ĝin antaŭ la ne klaskonsciaj amasoj kiel porĉiaman terurfantomon, por fortimigi ilin, por ekabomenigi al ili la socian revolucion kaj samtempe kun ĝi, la proletaran diktatorecon.

Sed, ĉu la diktatoreco kun sia teroro estas speciala unikaĵo aŭ propra eltrovaĵo de proletara klasbatalo? — Se ni analizas la socian historion de nia hodiaŭa, plej aktuala klasmalamiko, la burĝaro, kiu "leĝe per rajto de Justo" regas la proletaron, ni povas konstati, ke la perforto ne nur rimedo estas por la ekspluatanta klaso, sed ankaŭ la fundamento de ĝia ekzisto, kiun ĝi kun arteca hipokrito klopodas kaŝi sub la ŝajno de kulturo.

Ĉe la naskiĝo de l' kapitalisma sociordo, la burĝaro ne hezitis alpreni ĉiujn metodojn de teroro, por konservi la venkon. La kapitalismo komenciĝis per malkaŝa diktatoreco de l' burĝaro. — Marks en "La Kapitalo" skizante la pradevenon de akumulado, detale priskribas ĉiujn sennombrajn perfortojn, sangajn kruelaĵojn, per kiuj la burĝaro klopodis devigi la ekspluatatan klason, adaptiĝi al siaj produktdisciplinoj. Kiel ajn malrekonas hodiaŭ la prudeca, falspia, ŝajnkultura, kapitalista socio, — la ekzistadon de ĝia regado nur perforto, nur diktatoreco konfirmis kaj konservis. La fundamento de kapitalismo sin bazas je subpremo, ekspluatado al aliaj klasoj, do estas evidente, ke la diktatoreco kun sia perforto ne likvidiĝis, sed post la solidiĝo de regpovo, post la revoluciaj sukcesoj ŝanĝis la formojn, t. e. transformiĝis je "leĝaj rajtoj". Tiu formo de diktatoreco ne estas tiel kontraste rimarkebla, ĝi ne ĝenas per nuda perforto la obeulojn. Sed tuj, senhezite la premantaj rimenoj de koda paragrafaro entranĉas la karnon de ribeluloj, se ili provas forskui la katenojn de tiu altrudita leĝa regado. — La administraj ŝtataj aparatoj: bone organizita polico, korporacioj el spionoj, ĝendarmaro, ferdisciplinita armeo, aro da karceroj, pundomoj estas la ĉiumomente mobilizeblaj teror-aparatoj de la reganta burĝaro, por sufoki ĉiujn ekmovojn celantaj la forigon de ĝia privilegiita klasa potenco.

Dum la antaŭmilita tempo, dum la lastaj kelkaj jardekoj, la kapitalismo havis sian t. n. "pacan evoluon". Dum tiu periodo la edukado celis la estimon al ŝtataj leĝoj, konsideri ilin ne ŝanĝeblaj, eterne ekzistantaj, devenantaj de ia superhoma forto, kvazaŭ naturleĝoj. Sufiĉis por la narkotado de la konscio la religiaj ritoj, la patriotismo, laŭta demokratio, liberalismo ktp. La ŝajnsoci-

KOZAKOJ[1]

El urbo Ĉimkent (Mez-Azio), kie mi nun oficas kiel studento-praktikanto, oni sendis min en pure nomadan regionon por amasaj inokuloj kontraŭ aperinta en kozakaj brutaroj epizootio[2]. Tiu regiono troviĝas malproksime de loksidaj vilaĝoj kaj urboj, barita for de ili per altaj montaroj — branĉoj de La Granda Tjan-Ŝan, — kaj vastegaj senakvaj sablaroj. Forestas tie iuj ajn vojoj, oni ne konas tie radajn veturilojn kaj vojaĝas rajde sur ĉevaloj, kameloj kaj bovoj. Sammaniere, post tritaga laciga vojaĝo sub bruligaj radioj de l' suno, grimpado de monto monten, mi trafis tien. Miajn observojn pri vivo kaj moroj de kozakoj mi prezentas al la Ge-SAT-anoj kun atentigo, ke ili rilatas al la plej malkulturaj lokoj de Kazakstan (Kozaka SSR), kien reformoj de l' soveta registaro malfacile kaj malrapide penetras.

La kozakoj estas nomadoj. De frua printempo ĝis profunda aŭtuno ili migras kun siaj brutaroj, haltante sur unu loko ĝis la paŝtejo estas taŭga, kaj moviĝas denove al aliaj lokoj, kiam la herboj konsumiĝas. Tiele ili formigras de sia vintra loĝloko je milo kaj pli da kilometroj. Dum la migrado ili loĝas en feltaj jurtoj (kabanoj), vintre — ĉu ankaŭ en jurtoj, ĉu en mizeraj argilaj kabanoj, en kiuj kune kun homoj troviĝas junaj ŝafidoj. Savante sin de kruelaj malvarmaj ventoj, la kozakoj konstruas kabanojn en iu intermonto, en dezerto starigas jurton sub defendo de sablara monto. Vintre la vojetoj kaj vojoj en la montaroj fariĝas netraireblaj kaj iu ajn komunikado kun la ekstera mondo ĉesas por kelkaj monatoj.



Kozako melkas ĉevalinon

La kozakoj ne faras provizon da fojno por vintro, kaj la brutaroj mem nutras sin. Antaŭe per siaj fortikaj hufoj la ĉevaloj disfosas neĝon kaj ŝirpinĉas sekan herbon, poste sur tiu loko sin paŝtas bovoj kaj ŝafoj. Kiam en iuj jaroj la tero kovriĝas per glacia krusto, kiun ne povas trabati eĉ ĉevaloj, venas "gut" — terura malfeliĉo por la nomado: la brutaroj amase pereas pro malsato, kaj riĉa kozako dum kelkaj tagoj fariĝas almozulo.

Genta vivmaniero

Ĝis nun ankoraŭ la kozakoj havas gentan vivmanieron. Kiel en vintra loĝloko, tiel dum somera migrado ĉiu gento okupas delonge difinitan teritorion. Intergenta malpaco, lukto de gentaj grupoj, moro de sanga genta venĝo ne estas ankoraŭ plene forvivigitaj, precipe en malproksimaj de kulturaj centroj regionoj, kaj ties resonoj estas renkontataj eĉ en partiaj vicoj kaj soveta administra aparato malgraŭ senkompata batalo kontraŭ tio fare de la registaro kaj la partiaj organoj. En mia praktiko estis okazoj, kiam kozakoj el najbaraj lokoj ne alkondukis hejmbestojn por kuracado, ĉar en la loko, kie ni haltis, loĝis gento malpaca al ili.

La familia vivo

En la kozaka familio regas patriarka vivmaniero. La familia ĉefo estas sola mastro de la tuta posedaĵo, sinjoro super aliaj membroj de la familio, kies ordonoj estas sendiskute plenumendaj. La tuta laboro kuŝas sur la ŝultroj de virinoj, malpliaĝuloj kaj ĉe riĉuloj — sur dungitaj laboristoj. Cetere ili evitas havi dungitojn kaj ĉiurimede penas ŝajnigi sin malriĉaj aŭ mezriĉaj por ne pagi grandajn impostojn. Interalie eksproprigo de riĉuloj, kiu okazis en Rusio en j. 1918, estas efektivigita en Kozakio nur pasintjare. Oni rekviziciis ĉe la riĉuloj brutarojn kaj disdonis ilin al malriĉaj kozakoj (80%) kaj kolektivaj mastrumoj (20%). 700 riĉuloj estas elloĝigitaj el siaj vilaĝoj en aliajn distriktojn, por ke ili ne propagandu kontraŭ la soveta sistemo.

Pli malpli riĉa kozako faris nenion, estas maldiligenta, li povas sidi en la jurto semajnon kaj nur dormi, manĝi ŝafaĵon kaj trinki kumis-on[1], vespere vizitante la najbaron por babilado. Se li ekaŭdis, ke iu aranĝas festenon, li tuj forlasas la hejmon kaj kapablas rajdi por regalaĵo cent kilometrojn. Ofte grupoj da tiaj senfaremuloj vojaĝas de unu najbara vilaĝo al la alia al konatuloj, babilas kaŭrante kelkhore en jurto, dum oni buĉas por ili ŝafon kaj preparas manĝaĵon. Post bona manĝado ili tuj forveturas pluen kaj vagas tiel dum kelkaj tagoj, forgesante pri siaj devoj de mastro, edzo kaj patro.

Virinoj kaj infanoj

La virino plenumas absolute la tutan laboron, komencante per preparado de manĝaĵo, bestbredado kaj finante eĉ per laboro en kamparoj. Ŝi ĉiam estas okupita. Eĉ al la najbarino bonuzi liberan duonhoron ŝi venas kun ŝpinilo. La virinoj preskaŭ ĉiuj estas analfabetaj, neniam ili forlasas la hejmon, nenion vidas krom sia vilaĝo; malmultaj el ili vidis la urbon, kaj feliĉa estas kozakino, se la edzo prenis ŝin je bazaro. Poligamio kaj aĉeto de edzino estas malpermesitaj, sed en kaŝa formo ankoraŭ ekzistas. Malofte oni povas vidi sincerajn rilatojn inter geedzoj: viro ĉiam

[1] Kozakoj ĝis la revolucio estis nomataj de l' rusoj "kirgizoj". Ne miskomprenu kozakojn — popolon de turka-mongola raso — kaj kozakojn-rusojn, klason de militigitaj terkulturistoj, kiu ekzistis ĝis la revolucio kaj havis diversajn privilegiojn de la carismo.

[2] Amasa infekt-malsano ĉe bestoj.

[1] Acida ĉevalina lakto, enhavanta iomete da alkoholo.

---

ema politiko ankoraŭ efikis por brili en filantropa humanismo, prokrastadi per "leĝa regado" la malkontenton de l' ekspluatata popolo. Sed la imperialisma mondmilito forviŝis multon el tiuj influoj. La mondmilito ne nur seniluziigis, vekis, klaskonsciigis larĝajn tavolojn de la popoloj, puŝante la proletaron al revolucia periodo, sed ankaŭ ekdetruis en sia fundamento la kapitalistan sociordon, ĵetante ĝin al tiaj ekonomiaj krizoj, kiujn ĝi ne povas normale, definitive, por la popoloj kontentige solvi. Tiu baraktado de mondekonomio vole-nevole retro-kondukos al pli teruraj, pli sovaĝaj, en dimensioj pli gigantaj mondkonfliktoj. Kaj tiun procezon nur pli rapidigas, pli maturigas la teknika evoluo de la produktado.

Por refirmigi sian regpozicion, konservi por si la ŝtataparaton kaj surogati la perditan aŭtoritatecon de siaj klasservantaj kodoj, la burĝaro denove, kiel ĉe sia naskiĝo, reiras al la malkaŝa teroro kaj diktatoreco. La blanka teroro, kies hodiaŭa difino estas la faŝismo, ne estas io alia, ol la malkaŝan perforton sen ajna honto agnoskanta, grandstila diktatoreco de la kapitalistaro, sed nun jam en internacia skalo, kontraŭ la laborista klaso.


Post la renverso de l' hungaria proletara diktatoreco, reekkomenciĝis la aktiva, malkaŝa diktatoreco de la burĝaro. Siatempe la burĝa gazetaro, por mildigi la barbarecon de l' hungara kontraŭrevolucio, klopodis ŝajnigi kaj kredigi, ke tiu blanka teroro estas nur erupcia kontraŭefiko al perforta proletara diktatoreco. En multaj landoj granda parto de l' laboristaro bedaŭrinde ankaŭ agnoskis, eĉ plifirmigis tiun tendencon. — La itala faŝismo, bulgara, rumana, pola, finna, k. c. teroroj, sekvantaj post la hungara, la evoluo kaj rezultoj de burĝaj kvazaŭrevolucioj en Germanio, Aŭstrio, la kreskanta trudemo de ofte per perforto organizita, ŝtate helpata faŝismo preskaŭ en ĉiuj eŭropaj landoj, hodiaŭ jam klare pruvas la mensogemon kaj falsecon de tiu aserto. Dek batalplenaj jaroj, pasintaj komence de ekapero de senkaŝa diktatoreco burĝa, — kiuj sendube alportis gravajn revoluciajn spertojn al la Proletaro — pruvas al ni, ke la hungara, blanka teroro, estas nur ero de tiu longa ĉeno, kiu hodiaŭ sufokas la gorĝon, tenas en katenoj la liberiĝon de l' tutmonda Proletaro.

Neniu.

(Finota.)

INFANA RESPUBLIKO EN SAKSIO

Socialistaj infanoj tutsaksiaj konstruis tendaron proksime de Kecŝenbroda (Kötzschenbroda) apud Dresden laŭ la modelo de l' unua "Ruĝa Respubliko Zekamp (Seekamp)" en la jaro 1927. La infanoj regis mem. La tendaro estis dividata en kelkajn vilaĝojn. Ĉiu vilaĝo balotis delegitojn por la parlamento. Tie ili laboris laŭ la modelo de l' regna parlamento. Dum ĉi tiu somero aranĝiĝis en Germanio kaj Danio kelkaj Infanaj Respublikoj. Por ke vi ekkonu la vivon en tia Infana Respubliko, mi priskribos gajan kaj seriozan dimanĉojn:



Dimanĉo, 28. julio 1929. La vagonaro kondukis nin al la bele lokita urbeto Kecŝenbroda. La regno de niaj infanoj estis nia celo. Krute suprenŝiras la strato dekstre de l' rivero Elbe al monteto. Geknaboj en bluaj kiteloj vigligis la straton, salutante per la konata saluto "Amikecon" (germ.: Freundschaft). Sur la monto ni tramarŝis belan arbaron. Nun ni vidis sur herbejo tendaron ĉirkaŭitan de arbaro. Ĝi estis ornamita per ruĝaj flagoj. Pli ol 800 geknaboj loĝis tie. En la mezo de l' placo ludis junaj muzikantoj de l' "Regna Standardo" (germ.: Reichsbanner) La Internacion.

Subite eksonis tamtamo kaj sur la flagstango aperis ruĝ-verda flago. "Ho, nun ni ricevos manĝaĵon!" kriis la infanoj. Jam kunportis gehelpantoj grandajn kaldronojn plenigitajn per manĝaĵo. La infanoj venis povilaĝe kun siaj pelvoj. Oni disdonis freŝajn fazeolojn kaj bovaĵon. Okulride ili plenigis la pelvojn. Kiu ne satiĝis, plenigis denove sian pelvon. Kiel postmanĝaĵon ili ricevis pudingon kaj framban siropon. Post la manĝo aperis verda flago. "Ho, nun ni ricevos poŝtaĵojn!" oni vokis ĉie. Ĉiuj kuris, por akcepti korajn salutojn de la amataj parencoj en la hejmo. Bedaŭrinde la poŝtejo ne plenumis ĉiujn dezirojn. Sed baldaŭ ekheliĝis la vizaĝoj, kiam la voko eksonis: "Posttagmeze okazos c i r k o!" Scivoleme ĉiuj atendis la okazontaĵojn, kaŭrantaj tere ĉe la bordo de l' arbaro. Ĉeestis ĉ. 2000 homoj. Tamtam-sono! Ĉiuj aŭskultis atente la parolanton, kiu per humora alparolo malfermis la "cirkon". La loĝantaro de l' tendaro prezentis la "geartistojn". Plej atentinda estis la "internacia popolaro". Nova tamtamsono, kaj jam elpaŝis en pentrinda grupiĝo preskaŭ ĉiuj rasoj de l' mondo. Per la plej simplaj rimedoj la infanoj havigis al si aspekton kaj vestaĵon de l' plej diversaj nacioj. Oni vidis ĉinojn, kiuj portis longajn harplektaĵojn. Krome aperis negroj, nigrigitaj homoj portantaj lumopendaĵojn el kano. Kun ŝildoj kaj lancoj ili prezentis militdancojn. Poste aperis araboj akompanitaj de siaj haremaninoj. Ĉi lastaj gracie dancis. La nun aperantaj indianoj fumis siajn pipojn kaj salte prezentis kun la tielnomata "medicinviro" la faman "dancon de mortintoj". Je la fino de l' prezento oni vidis la boksadon okazintan inter la mondmajstroj en Usono. Per laŭtparolilo estis komunikataj rezultoj de ĉi tiu batalo al la "tuta mondo". Grandegan amuzon kaŭzis, kiam la paroj kun farunŝtopitaj boksgantoj atakis unu la alian. Satire observis la diskoniganto ĉiujn fazojn de l' batalo, uzante kiel mikrofonon malnovan fruktokorbon. La grupaj kaj piramidaj aranĝoj de kelkaj geknaboj meritas mencion. Ili estis lertaj gimnastikuloj. Senfina aplaŭdo rekompencis la infanojn por ilia laboro. Sed bedaŭrinde la vizitantoj devis forlasi la tendaron, ĉar la vagonaro ne prokrastus la forveturon.

Dimanĉo, 4. aŭgusto 1929. En tiu tago vizitis denove kelkaj gepatroj la infanojn en la tendaro. Estis edifa aspekto, kiam ni matene eniris la tendaron. La suno briletis sur la tendoj. Ĉe la limoj de l' Infanrespubliko staris la gardantoj. En la tendaro oni jam vigliĝis. La infanoj ordigis siajn vestojn kaj ŝuojn. Aliaj labordeĵoris laŭ la leĝo de l' infanaro. Oni estis devigata admiri la modelan ordon, kiu tie regis. La infanoj bonfartis kaj estis gajaj. Mi ne vidis dolorvizaĝon dum la tuta tago.

Montrante la novan regnon de l' infanoj al la gepatroj, la infanoj fiere ĝojegis. Oni mem emis resti tie pro tiom da belo. — Posttagmeze estis aranĝata aparta festo. La gepartianoj de l' SPD (socialdemokrata partio germ.) el Dresden estis anoncitaj. Ni devis ree admiri, kiel la infanoj efektivigis siajn leĝojn. Ili ne permesis la konstruadon de bierbutikoj en la tendaro. Tamen ni plenaĝuloj "nepre bezonas" ilin. Nu, trink- kaj manĝaĵoj ankaŭ bongustis e k s t e r la limoj de l' tendaro.

Manĝinte pli ol 800 geinfanoj marŝis al la stacidomo Kecŝenbroda, por akcepti la Dresden-ajn SPD-anojn. La infanoj estis vestitaj per la konataj bluaj "falk"[1]-kiteloj. Kia edifa aspekto, kiam la infanoj poste enmarŝis la tendaron. Ili transiris altaĵon. La marŝanta aro similis bluan rubandon sur griza tero. Je la pinto marŝis tambur- kaj fajfantaro el gimnastikuloj. La infanoj formis kvarangulon sur la placo inter la tendoj. Dume enmarŝis la gepartianoj tra la enirejo. La aro ŝajnis ne finiĝi. Ankaŭ la nombro de l' ruĝaj flagoj ĉiam pligrandiĝis. Intertempe oni starigis laŭtparolilon en la valeto. De tie salutis partisekretario K-do Sander el Dresden la Infanan Respublikon. La tuta aranĝo estis manifestacio kontraŭ militoj. Forpasis ja 15 jaroj depost komenciĝo de l' terura milito. La oratoro per laŭtparolilo efike aŭdigis la konatan poemon: "Tri minutojn aŭskultu!", dum Dresdena orkestro de l' Regna Standardo ornamis la solenon per belaj muzikaĵoj.

Bedaŭrinde ni gepatroj tro frue devis forlasi niajn gefilojn. Vespere okazis procesio da torĉ- kaj lampion-portantoj al la stacidomo. Infanoj ĉiulandaj, imitu tiun tendar-komunumon kaj vi ĝuos grandajn ĝojojn!

F r i e d r. N i t z e (9958), Zittau.

[1] "Falko" nomiĝas speco de skolto.

---

sentigas, ke li estas la mastro kaj sinjoro super la edzino.

Malkulturo, malklero, abomenaj vivkondiĉoj kaŭzas, ke la virino tre inklinas al malsanoj. Ne ofte vi sukcesas vidi en la stepoj sanan freŝan virinon: jam en la juna aĝo ŝi similas maljunulinon.

La geinfanoj kreskas sen iu ajn eduko. Ĝis 5—6 jaroj la knaboj somere kuradas nudaj kaj sub sunradioj fariĝas brunaj kaj harditaj. La knabinoj ĉiam estas malgrasaj kaj malsanemaj. Multege da infanoj pereas pro diversaj malsanoj kaŭze de malbona vartado. La patroj preskaŭ neniam karesas kaj vartas infanojn, konsiderante tion ne deca por la viro. La patrinoj estas okupitaj, kaj suĉinfano ploregas ĝis ĝi estas nutrita kaj trankviligita de la sama suferantinopatrino. Oni ne atentas la infanojn: se ili eltenas kaj vivos — bone, se ili mortos — ankaŭ ne valoras domaĝi. Moralan edukadon la gepatroj ne atentas, kaj la infanoj rapide alproprigas al si la malbonajn kutimojn de l' maturuloj, tiel ke de 5-jara infano vi povas aŭdi terurajn insultojn.

Kvankam la kozakoj, kiel ĝenerale nomadoj, estas malpli religiemaj, ol ekz. loksidaj uzbekoj, la religio dume regas en la stepoj. Mi renkontis kredantojn eĉ inter komunistoj. Ili — sovetaj oficistoj por aferoj alveturintaj stepon el la urbo — klarigis al mi sian sintenon tiel, ke religio en la stepo estas forta, amasoj religiemaj kaj ili devas submetiĝi al la moroj. Tamen ili bonege konscias, ke ilia sinteno ne indas kompartianon kaj plenumas postulojn de l' religio kaŝe de partiorganoj.

S. B o j e v, montaro Kara-taŭ apud urbo Ĉimkent.

(Finota.)

K-doj! Zorgu, ke gazetoj enpresantaj viajn tradukojn el "S-ulo", nepre menciu la fonton!

EL LA HISTORIO DE L' SOCIALISMO

19. Pri la historio de l' himno: "La Internacio"

(Fino.)

La 23. julio, je 9-a horo vespere, kiam, antaŭiritaj de l' socialistaj fanfaroj kaj eskortitaj de miloj da kunbatalantoj, la kongresanoj iras procesie al la palaco Ramo (Rameau), kie punĉo al ili estis prezentata, la interpuŝiĝo okazis en la strato inter la naciistoj kaj la trupoj de l' Lab. Partio. Ĝi etendiĝas tra la tuta vespero. Ĉe la placo de l' Stacidomo kaj placo Bihur (Bihour), precipe estas vera batalo laŭ vicoj. Dum la reakciuloj klopodas kanti La Marsejezon, la socialistaj fanfaroj ludas La Internacion kaj la Lilaj[1] laboristoj ritme kantas fortege ĝiajn parolojn:



"La popolo kreskis, skribis en sia raporto La Vekiĝo de l' Nordo. Tiuj ĉi junaj furiozuloj krias per ĉiuj siaj fortoj: Vivu Francio! For Prusion! Al iliaj krioj niaj amikoj, kiuj estas tie multnombraj, respondas per la rekantaĵo miloble ripetita de l' Internacio...

...Oni interpremiĝas, puŝiĝas. Oni kantas La Marsejezon, kiu estas tuj superkovrata de l' kantado de La Internacio...

...Jen, terura kunpuŝiĝo estiĝas; sed niaj amikoj tenas bone, kaj la muzikistaroj, malgraŭ la plifortiĝanta tumulto, sonigas La Internacion kaj la standardoj elstaras triumfe el la amaso..."

Oni povas diri, ke kantante la himnon de Potje la laborista popolo venke forkurigis la Lil-an reakciularon enirintan la straton.

De tiu ĉi tago datumas ĝia vulgariĝo tra Francio.

La delegitoj al la Lab. Kongreso, venintaj el Parizo kaj la diversaj departementoj, aŭskultas kun surprizo kaj retenas tiujn ĉi strofojn, kiuj tradukas la socialistan penson, kiuj diras samtempe iliajn koleron, esperojn, komunajn depostulojn; ili aŭdas kaj retenas en memoro tiun ĉi muzikon samtempe larĝan kaj potencan, fortikan kaj ardan, kiu ritmas admirinde la solidan kaj fieran paŝon de l' proletoj marŝantaj kaj kiu direktis kaj subtenis ilin tra la stratoj de Lil dum ilia lasta manifestacio.

Ne estas delegito de Parizo, de Monlüson, de Lion, de Grenobl, ktp.... kiu ne, aŭdinte la Internacion aklamitan de la amaso de l' Nordo, volus ĝin eklerni antaŭ la disiĝo de l' Kongreso. Ne unu eĉ forlasas Lilon ne estante provizita per pluraj ekzempleroj de tiu ĉi belega ĝis nun nekonita kanto. Kaj tiel ĉiu reirante al sia grupo, sia sekcio, sia federacio, enkondukas tie, kaj siavice instruas tie la parolojn de Potje kaj la muzikon de Degeter.

Tuj post la Kongreso de Lil La Internacio ne plu estas sole la preferata kanto de l' Ged-istoj (Guesdeistoj) de l' Nordo. Ĝi fariĝas la himno elektita — kaj iagrade oficiala — de l' tuta Franca Lab. Partio: kaj ĝi estos de tiam eksonigata de ĝiaj kunbatalantoj en iliaj manifestacioj, ĉe la eliro el iliaj kunvenoj, ĉe l' fino de iliaj festoj kaj iliaj kongresoj.

Tri jarojn pli malfrue, nova eksuprentiro de La Internacio.

De l' 3.—8. decembro 1899 la diversaj francaj socialistaj grupoj kuniĝas en Kongreso de Parizo, gimnazio Ĵapy (Japy). Oni nomas tion en la historio de l' franca socialismo nuntempa la "Unuan ĝeneralan Kongreson de l' francaj socialistaj organizoj". Tie renkontiĝas Alemanistoj, Blankistoj, Brusistoj, Gedistoj kaj sendependuloj[1]. Oni diskutas pri la ministrara partopreno laŭ propono de Mileran (Millerand), kiu eniris ses monatojn antaŭe la ministraron Valdek-Ruso (Waldeck-Rousseau). Inter ministraj socialistoj kaj revoluciaj socialistoj, inter Ĵores (Jaurès) kaj Julio Ged (Jules Guesde) la diskutoj estas speciale vivaj, kaj la kunvenoj de l' Kongreso estas abundaj je tumultaj okazetoj. Sed la lastan tagon unuiĝa manifestacio sekvas la disputojn kaj la Kongreso finiĝas en atmosfero de ĝenerala konkordo. En la momento, kiam la prezidanto parolas la finvortojn, la Ged-istoj vokas al la tribuno unu el la siaj, Henrikon Gekier' (Ghesquière), delegito de l' Nordo, kaj petas lin kanti La Internacion. La stenografa oficiala protokolo rakontas la scenon en la sekvantaj vortoj:

"La malpendigitaj standardoj estas malvolvitaj antaŭ la tribuno: la civitano Geskier' suriras ĝin kaj ekkantas La Internacion. La tuta ĉeestantaro entuziasmigite kunkantas la rekantaĵon. Tiam la delegitoj ĉirkaŭpaŝas la salonon antaŭiritaj de siaj standardoj[2]."

Depost tiu ĉi tago ĉiuj francaj socialistaj organizoj akceptas La Internacion. Kiel la Federacio de l' Nordo ĝin donis al la Lab. Partio, la Lab. Partio donas ĝin siavice al la tuto de l' franca socialismo. Sekvu ni ĝin nun trans la limojn.

La unuaj internaciaj socialistaj kongresoj, kiuj kunvenas en la lastaj jaroj de l' 19-a jarcento, ne konas evidente la strofojn de Eŭgeno Potje, kaj ili restas fidelaj al tiuj de Ruĵe delil, kiuj ne ankoraŭ estas alproprigitaj de la naciista reakcio.

Tiel, kiam la 23. aŭgusto 1891 la gvidanto de l' Belga lab. partio, Johano Volders, deklaras fermita la kongreson de Bruselo, li proponas "por fini tiun ĉi kongreson, kiu firmigis la ligojn inter ĉiuj proletoj tutmondaj, leviĝi kaj kanti la revolucian internacian himnon La Marsejezon". Je tiu ĉi alvoko ĉiuj delegitoj stariĝas kaj senĉapeliĝas, nepriskribebla emocio regas, la ĉapeloj kaj poŝtukoj moviĝas[1]. De Bruselo la kongresanoj iras al Gent (Gand) por tie viziti la famekonatan kooperativon "Vooruit"; akcepto okazas "per la kanto de La Marsejezo plenumita de la Harmonio kaj akompanita de ĉiuj ĉeestantoj[2]. Revene al Bruselo "oni eniras la Popoldomon, ĉe la sonoj de La Marsejezo, plenumita de la Laborista Fanfaro[3].

La internacia kongreso de Kopenhago (28. 8. ĝis 3. 9. 1910) finiĝas en la sekvantaj kondiĉoj: "La francoj ekkantas La Internacion, diras la oficiala protokolaro; la aŭstroj La Kanton de l' Laboro; la svedoj, danoj, norvegoj kaj angloj, sian batalkanton; tiam, fine, la tuta Kongreso kantas, en vibranta entuziasmo, La Internacion[4].

De tiam la Rusa Revolucio triumfanta, foriganta la "Boje Cara Krani" kun ĉiuj simboloj de l' malnova reĝimo, faris La Internacion la oficiala kanto de Sovetio.

Tiel la himno de Eŭgeno Potje, verkita en 1871, longtempe restinta nekonata, muzikigita de Petro Degeter en 1888, kantita unue de kelkaj batalantoj en la Nordo, vulgarigita de la Kongreso de Lil (1896), tiam de la Kongreso de Parizo en 1899, tiam de la diversaj internaciaj kongresoj, ĉirkaŭiris nun la tutan mondon. Ĝi pravigas vere sian nomon. Ĝi estas hodiaŭ la universala kanto de l' Socialismo kaj de l' Laboro marŝanta al la Revolucio.

Aleksandro Zévaes. Trad. N. B.

---

[1] Lille-aj.

[1] La div. socialistaj tendencoj, nomitaj laŭ siaj gvidantoj.
[2] Ĝen. Kongreso de l' francaj soc. organizoj: Stenografa oficiala protokolaro (Librejo Georgo Bellais), pĝ. 407.

[1] Socialista Lab. Kongreso internacia tenita en Bruselo: Protokolaro publikigita de la belga sekretariejo (Presejo Vve Désiré Brismé, Bruselo), pĝ. 95.
[2] Same, pĝ. 99.
[3] Same, pĝ. 101.
[4] Internacia Kongreso de Kopenhago, protokolaro analiza publikigita de la sekretariejo de la Internacia Socialista Oficejo, pĝ. 397.

En katenoj de la maljusteco

Virina Krestomatieto

40 paĝoj. Prezo: 0,60 mk. g.

Mendu ĉe **Administrejo de SAT**, Colmstr. 1, **Leipzig O 27.**

SENNACIULA SPORTA PAĜO

Kompilanto: Ad. Wendt, Leipzig O 27, Lange Reihe 11-a (Germ.)

Sporto kaj ĝia signifo por la internacia Proletaro

En la sekvantaj linioj ni publikigas paroladon de K-do Richard Koppisch (Kopiŝ), estrarano de Laborista Gimnast- kaj -Sportasocio de Germanio, kiun li faris okaze de la 9. SAT-kongreso en la kadro de la .Internacia Proleta Altlernejo.

Ĉu korpekzercoj ĝenerale estas necesaj?

Ili estas gravaj por ĉiu homo, sed plej necesaj por spirit- kaj manlaboristoj. Gravegaj malsanoj minacas ilin ambaŭ. Tiel antaŭ ĉio raĥito kaj tuberkulozo. Kaŭze de ambaŭ malsanoj mortas ĉiujare centmiloj da proletoj kaj milionoj malsanadas vivlonge. Ili plenrajte estas nomataj proletaj malsanoj, ĉar ilia disvastiĝo preskaŭ senescepte trafas la Proletaron. Ambaŭ estas malsanoj, kiuj ne bezonus ekzisti, kiuj ne ekzistus, se ni ĉiuj povus vivi efektive hominde. Ili estas unue: malsanoj de la nesufiĉa nutrado, due: malsanoj de la trolaboro — tial laŭpec-laboro plej trafe estas nomata mortlaboro. Pro tio la postulo pri mallonga labortempo ankaŭ tute ne estas postulo de la maldiligentuloj, sed ĝi estas nepra neceso por la konservo de la homa sano, ĝi estas nepra ordono de la sinkonservo — trie: ili estas malsanoj de manko da lumo kaj aero.

Manko de lumo kaj aero estas sekvoj de la loĝeja mizero, ĉar la statistiko pruvas neerarige: ju pli dense loĝas la homoj, des pli certe trafas ilin raĥito kaj tuberkulozo. Terurige raportas pri tio la lernej- kaj malriĉul-kuracistoj el la proletaj regionoj kaj proletaj kvartaloj de grandurboj.

El nesufiĉa nutrado, trolaboro kaj loĝeja mizero nur savos nin celklara klasbatalo en la sindikatoj kaj laboristaj partioj prolettendencaj. Tio estas devo de la memkonservo por ĉiu proleto.

Alia terura malamiko de niaj organoj estas la polvo. Ŝton-, metal-, lan-, tabak-, ligno- kaj karbo-polveretoj ŝtopas niajn tiom treege delikatajn kaj etajn pulmveziketojn; ili estas tiom delikataj, ke ili nur estas rekoneblaj sub plej akraj mikroskopoj. Se la polvo krom tio estas venena, kiel ĥemiaj acidoj, aŭ se ĝi estas akroranda, kiel la polvo de ŝtonoj kaj metaloj, tiam ĝi disŝiras kaj distranĉas la tre malgrandajn pulmveziketojn, kaj la tuberkulozaj baciloj trovas plej imageble bonan grundon por multegiĝo.

Tuberkulojn ni ĉiuj enspiras en miriadoj da milionoj. Sed ili pereas en sanaj pulmoj nemalutilante post malmultaj tagoj. Nur en malbone aerumitaj, venenitaj kaj polvo-disŝiritaj pulmoj ili enplantiĝas.

Kontraŭ la malutiloj de la polvo kaj de la aermanko ni mem povas gardi nin per sistemaj korpekzercoj kaj laŭnatura loĝeja flegado. Ni aerumas plej parte tro malmulte niajn loĝejojn. Sed: lumo kaj aero en la domo detenas malsanojn de la homo — kien venas la suno, tie kuracisto estas senokupa — je la ombroflanko haltas la ĉerkveturilo trioble tiom ofte, kiom je la sunflanko. La suno estas la plej bona desinfektilo. En ejo — aerkaj suntrafluita, situata suden, vivas bakterioj ĉiuspecaj maksimume dum la daŭro de tri tagoj; en neaerumita kaj eble eĉ malseketa ejo, situata norden, ses monatojn kaj pli longe. Tio estas saĝo nerefutebla. Tial: aerumi kaj elmeti al la suno loĝejon kaj litojn estas pli valora ol kuracisto kaj medicino.

Mankas ankoraŭ moviĝo en lumo kaj aero. Jen la sporto plenumas sian taskon. Ĝi kondukas la homojn al plej ampleksa moviĝo en suno, aero kaj akvo. La korpekzercoj en freŝa aero, ja eĉ ankaŭ la gimnastado en haloj okazas en formo de juneca ĝojo per ludoj, konkuroj, migroj, naĝoj, glacikuro kaj skiado ktp.... Ili pro tio kreas bonfarton kaj eĉ plej puran ĝojon. Ĝojo estas la plej bona kuracisto.

Laborkolegoj ofte asertas, ke ili dumtage devas sufiĉe penegadi ĉe la laboro. Tial ili ne plu bezonas korpekzercojn. Tio estas erara. Ni havas ĉirkaŭe sescent muskolojn en la korpo. Nur moviĝo estas vivo, absoluta ripozo estas morto. Tiel estas ankaŭ ĉe la muskoloj. Per konstanta ekzercado pliampleksiĝas ĉiu muskolo — kreiĝas novaj muskolfibroj — kaj la muskoloj plifirmiĝas. La neekzercita muskolo kripliĝas. Metu ni la brakon de la plej forta atleto en gipsbandaĝon — la brako estas tute sana, temas nur pri eksperimento — ni lasu la brakon proksimume ses semajnojn en la bandaĝo — devigante ĝin per tio al plej granda ripozo — tiam estas malaperintaj la grandegaj muskoloj, lia brako estas tute senforta. Ĉar absoluta ripozo estas morto. Longdaŭra ekzercado estas necesa por regajni la malnovajn fortojn; multe pli longa tempo estas bezonata, ol por la forigo.

La raciigita laboro faras el la homo nur plej malgrandan eron de maŝino. Tagon post tago, jaron post jaro ĉiam ripetiĝanta la sama manmovo trostreĉas malmultajn muskolojn, sed kripligas la plej multajn. Kioma varieco da movoj necesas, por evoluigi ĉiujn muskolojn samforme, estas tute nekredebla. Nur unu pruvo pri tio, kiun ni volas havigi al ni per eksperimenteto. Bonvolu ĉiuj kunagi! Ĉar konvinko praviĝas. Nur kiu ne havas muskolojn, tiu ne bezonas kunagi (Ridado).

Ni ĉirkaŭprenu la bicepson de la dekstra brako per la maldekstra mano — dekstra manplato antaŭen kiel eble plej eksteren, ni faru pugnon kaj fleksu la brakon supren. Tiam ni sentas pliampleksiĝon kaj plifirmiĝon de la muskolo. Tiu ĉi muskolo estas nomata "brakfleksanto". Ni ankaŭ sentas, ke la muskolo laboras. Bonvolu teni firme la muskolon. Nun okazas la plej interesa afero. Ni turnu la pugnon eksteren, sed tenu la muskolon. Ni sentas, ke la muskolo fariĝis mola. Tio pruvas, ke ĝi strikas. Pli malsupre situataj muskoloj transprenis la laboron de la brakfleksa muskolo. La bicepso fleksas la brakon nur en tiu ĉi teniĝo. Ripetu la movon! (Oni ripetas.)

Per tio mi pruvis, ke jam malgravaj ŝanĝoj en la sinteno aktivigas aliajn muskolojn.

Por atingi plej ĉiuflankan evoluon de la muskolaro estas necesaj miriadoj da movformoj. Tiun ĉiuflankecon ne havigas al ni eĉ la plej vigla laboro. Tial estas necese praktiki korpekzercojn. Ĉar nur la perfekte disvolvita korpo estas sana, bela kaj plene laborkapabla.

Kial laborista sporto?

En niaj medioj ĉiu scias pri la grandioza luktado, kiun ni nomas klasbatalo. Tio estas la luktado de la malnova tempo kun la nova. Ĝi estas la batalo de la senheredigitoj kaj subpremitoj kontraŭ siaj elsuĉantoj kaj subpremantoj. Tiu ĉi luktado tute ne tiel rapide kondukas al la celo, kiel tion revis la pioniroj de la Socialismo. Malgraŭ ĉiuj krizoj de la kapitalista socio ĉi tiu estas nuntempe pli forta ol iam ajn kaj eĉ ne jam estas videbla fino ĝia. La forfalo de la kapitalismo povas daŭradi ankoraŭ longe.

Spite tio la Socialismo jam grave antaŭenmarŝis. La anaro konstante pligrandiĝas, malgraŭ ĉiuj ondoformaj sukcesoj kaj malsukcesoj, kiel ni ankaŭ observas tion en ĉiuj movadoj, de la individua sorto de homo ĝis la sorto de tutaj popoloj kaj mondpartoj.

Sed la evoluo ne venas el si mem. Publika opinio estas arte kreata. En tio la kapitalista socio multe superas nin. Ĝi tenas preskaŭ ĉiujn regrimedojn en la manoj, ĉar ĝi posedas la monon. Per la mono ĝi akiras al si kleron. Scio estas potenco, klero igas libera.

Per tio ĝi regas la produktadon, diktas la laborkondiĉojn kaj la vivnivelon de la proletoj. Lernejo, eklezio, teatro, kino, radio, ĵurnalaro kaj multaj aliaj potencaj rimedoj por regi preskaŭ senescepte troviĝas en ĝiaj manoj, estas dependaj de ĝi, estas de ĝi kontrolataj kaj en ĝia spirito eluzataj kiel stultigiloj kontraŭ la popolo.

(Finota.)

Per legado vi lernas... Legu regule...
Abonu la semajnan legaĵon — "S-ulo"!



N-o 1 — 4-a jaro Gvidanto k kompilanto: O. BÄSSLER, Gerberstr. 24, Leipzig C 1 (Germ.) 3. Oktobro 1929

EL ESPERANTIO

Per eksperimentado — al sukcesoj!

Naskiĝis "nova" ido (?). Pli ĝuste: la ido ĝis nun nur estis en kvazaŭ embria stato. Pri kio temas?

Unuan fojon la legantoj trovas ĉi paĝon en "S-ulo", sur kiu ĉiusemajne aperos raportoj, kiujn ĝis nun ricevis k utiligis nur malvasta rondo de SAT-anoj. Jen nova "eksperimento", por efika utiligo de esp-o al la ĝenerala laboristmovado.

Depost januaro 1927 funkcias "Esperanto-Servo de SAT", kiu dissendis ĉiudusemajne multobligitajn raportojn el tuta mondo al tuta mondo. La rezultoj de tiu speciala peresp-a laboro instigis, pli vastigi la aparaton, do unuavice presigi la raportojn en la oficiala organo de "SAT". Ĉu tiu paŝo okazas en ĝusta direkto, ĉu ĝi eble estas mispaŝo, nur montros la estonto...

Unua devo estas, elektigi, komisii en ĉiu loko unu aŭ kelkajn Gek-dojn, kiuj speciale okupiĝos pri la utiligo de tiuj raportoj, t. e. traduki k presigi ilin en laboristaj presorganoj. Nur organizite la laboro estos plej sukcesa. La tradukado de raportoj ankaŭ povas okazi kolektive, dum kunvenoj, en kursoj k. a., kio nur akcelas perfektiĝon en la lingvo mem. La loka gazetservanto netskribu k transdonu poste la raportojn al gazetredakcioj.

Dua devo estas, liveri taŭgajn raportojn al la "Centrejo de Esperanto-Servo", kies adreso troviĝas sub la kapo de ĉi paĝo. Ni forlasu la ĝenerale malbonan kutimon, ke nur kelkaj Gek-doj, la "plej kapablaj", okupiĝu pri tiuj ĉi aferoj. Ĉiu SAT-ano estas samrespondeca, ke nia peresp-a laboro ĉiam pli vastiĝas.

Kiajn raportojn ni publikigu? Ili nepre diferenciĝu de aliaj artikoloj k raportoj en "S-ulo". La raportoj sur la paĝo de "Esperanto-Servo" estu plej koncizaj, ili nur prezentu faktojn pri ĉiaj okazintaĵoj en tuta mondo, kiuj speciale interesas k koncernas la proletan movadon. Aktualaj raportoj estas preferataj, ĉar estas la eblo, enmeti ilin lastmomente ankoraŭ en "S-ulon".

Multon ankoraŭ ni devus citi, sed prefere ni tuj eklaboru! La eksperimento fariĝu nova, akra glavo en nia peresp-a laboro, por la proletara klasmovado, kontraŭ imperialismo, faŝismo, kapitalismo — por la venko de la Proletaro el politika, ekonomia k kultura subpremo!

Centrejo de Esperanto-Servo.

EL LITOVIO

Oni kuracas per sankta spirito

(Esperanto-Servo.) En la distrikta urbeto Birĵe nunjare aperis mirakla kuracisto, kiu kuracas ĉiujn malsanojn per nura murmurado de certaj "sanktaj" vortoj. Dum merkataj tagoj en lia loĝejo k eĉ sur la strato ĉe lia domo staras multnombra klientaro, atendante sian vicon. Polico kelkfoje dispelas la malsanulojn, sed nenio helpas. Dum aliaj tagoj li vizitas vilaĝojn k multloke lian aivenon atendas kelkdekoj da malsanuloj, precipe virinoj. Kamparanoj nomas lin "sankta spirito". Onidire, li precipe "helpas" ĉe dentmalsanoj, por pli gravaj malsanoj necesas ripeta "kuracado". Rekompenco ĉe tiu "kuracisto" estas laŭpova, ĝenerale oni donas 0.50 ĝis 1.— lidon (1 dol. = 10 lidoj). Tiuj ĉi faktoj montras la kulturan nivelon de iuj litovaj kamparanoj.

Esper.-Kor., Kaunas.

EL AŬSTRIO

Viro fariĝas virino

(Esperanto-Servo.) Antaŭ nelonge venis al kuracisto en Vieno virine vestita persono. Kvankam tiu persono ĝis nun imagis al si, esti virino, la kuracisto konstatis ĝian virecon. La korpa formo samkiel la anima senteco estis tute virinecaj, sed mankis la decida signo, la virinecaj ĝermoglandoj. "Ŝi" havis virajn ĝermoglandojn!

Tiu homo, kiu ĝis nun imagis al si, esti virino, nepre nun ankaŭ deziris esti ĝusta virino. Kion fari? La kuracisto rekomendis, anstataŭigon de la viraj per virinaj ĝermoglandoj. Kaj tiu scienculo ankaŭ plensukcese faris virinon el tiu viro. Tio estis la unua fojo, ke oni sukcesis ŝanĝi homan seksecon.

V. L.

NOTU EN LIBRO

la titolojn kun n-oj (vidu dekstre en malsupra angulo) de raportoj, kiujn vi tradukas k presigas en gazetoj, ĵurnaloj k. a. Detaloj tiurilate aperos en la sekv. n-o! Unue elektu ĉiuloke gazet-servanton, kiu dume zorgu havigi al si tian notlibreton.

SUR POŜTKARTOJ

senditaj raportoj estas plej ŝatataj, ĉar ili neniam povos esti tro longaj! Proprajn nomojn ĉiam skribu legeble, plej bone PRESLITERE!

EL RUMANIO

Kondamnitaj je nomo de Rumanio

(Esperanto-Servo.) Komence de aprilo k. j. militistoj k policistoj ĉirkaŭis la laboristan hejmon en la urbo Timiŝ k pafis en ĝin, ĉar la laboristoj rifuzis redoni la kadavron de la laborista gvidanto, K-do Fonagy, kiu mortis en la famega karcero Doftana. Tio estis kaŭzo, arestadi k batadi laŭ "siguranca"-metodoj grandan aron da gvidantaj K-doj de la laborista movado.

Kontraŭ la arestitaj K-doj okazis granda juĝproceso, kiu finiĝis la 14-an de septembro. Kvankam neniaj "pekoj" de arestitoj estis atesteblaj, la policistoj k policagentoj ĉiam pli miksiĝis en kontraŭdiroj, la prezidanto de la juĝistaro, Popescu, en la lasta kunsido de la proceso komunikis vere nekredeblan verdikton.

Kvar K-doj estas kondamnitaj al po 1 jaro da mallibero k po 5000 leoj da monpuno. Kvar K-doj estis kondamnitaj al po 8 monatoj, 28 K-doj al po 6 monatoj da karcero. La neplenaĝulino, K-dino Popp Ilonka ricevis du monatojn da karcero.

Sed oni ne forgesu, ke per tiaj kondamnoj oni ne povas silentigi k neniigi la laboristan movadon. Ju pli oni persekutadas nin, des pli la klaskonscia Proletaro batalas kontraŭ siaj kapitalistaj subpremantoj.

SAT-ano 15 080.

EL LATVIO

La revolucia gazetaro en danĝero

(Esperanto-Servo.) La faŝista reakcio en Latvio trovis k komencis apliki novan metodon, por persekutadi la maldekstran gazetaron en "nia" lando. Antaŭe politagentoj okazigis traserĉojn en redakcioj, ĉe redaktoroj, arestadis ilin, forprenis la koncesion por eldoni ĵurnalojn ktp. Sed nun ili tute ŝanĝis la taktikon. La provokistoj ĉiam antaŭe scias, kiam aperas gazeto; je sama tempo ili iras al la presejo k tuj post apero konfiskas ĉiujn ekzemplerojn. Per tiaj rimedoj ili pli efike volas subpremi la revolucian spiriton. Vanaj estas iliaj atencoj; se la maldekstruloj ne povas eldoni siajn gazetojn legale, ili eldonos ilin nelegale — subtere, sed la revolucia vorto vivas k vivos!

Joseforo, Riga.

EL GERMANIO

Komenciĝas balot-bataloj

(Esperanto-Servo.) Dum oktobro k novembro k. j. en plej multaj landoj k komunumoj de Germanio okazos balotoj de lokaj k landaj parlamentoj. La komunumaj samkiel la landaj parlamentoj ĝis nun plej parte havis burĝajn pli-multojn. Sed ofte la pli-multo nur konsistis el kelkaj mandatoj. La antaŭbalotaj agitado k propagando, la dumbalota varbado estas plej atentindaj, nome ĉar la faŝistaj organizoj provas gajni el la nuna situacio. Plej impertinente, kuraĝigite pro kvazaŭa protekto flanke de regantaj instancoj, la faŝistoj provokas la proletajn amasojn. Sed ankaŭ la aliaj burĝaj organizoj plej pene ekagitadas. Certe tiuj balotoj iagrade montros la nunan spiritostaton k fortecon de la germana proletaro. (Mi konstante informos pri detaloj sur sekvantaj paĝoj de Esperanto-Servo.) O. B., Leipzig.

EL POLIO

Faŝismo — Juĝejo

(Esperanto-Servo.) La faŝista registaro en Polio serĉadas argumentojn por pravigi la persekutadon de la laborista movado k ĝiaj institucioj. La 18-an de septembro k. j. la polico okazigis rekvizicion en laborista librejo en Varsovio (fondita en jaro 1921), arestis kelkajn Gek-dojn k fermis la librejon. La burĝa gazetaro kriaĉas, ke oni trovis diversajn dokumentojn de CK de KPP (kompartio en Polio).

La 24. k 25. septembro okazis en Lodz 2 politikaj procesoj. Sep junuloj estis juĝitaj pro aparteno al la kompartio. Pro tiu "krimo" ili estas kondamnitaj: 1 je 5 jaroj da mallibero, 1 je 4 jaroj, 2 je 3 jaroj, 1 je 1½ jaroj, 1 je 1 jaro k unu estis liberigita.

J. C.

1-a listo de raportoj en jaro 1929/30

1. Oni kuracas per sankta spirito. Esper.-Kor., Kaunas (Litovio).
2. Viro fariĝas virino. V. L. (Aŭstrio).
3. Kondamnitaj je nomo de Rumanio. SAT-ano 15 080 (Rumanio).
4. La revolucia gazetaro en danĝero. Joseforo, Riga (Latvio).
5. Komenciĝas balot-bataloj. O. B., Leipzig (Germanio).
6. Faŝismo — Juĝejo. J. C. (Polio).

TRA ESPERANTIO

Postkongresaj konsiloj

Puriĝis la atmosfero
Post kongresa uragan',
Klariĝis la SAT-afero,
Ĝoju pro ĝi ĉiu an'.

Likvidiĝis la programo
Kaj diversaj ismoj,
Kiuj estis ĉefkaŭzoj
De internaj skismoj.

Eĉ la vorto-miskomprenon
El la tuta SAT-anar',
Forigos la novbakata
"Universala Vortar'".

Do vi ne plu malpacigu
Kun patro la filon,
Sed kun pekpenta mieno
Aŭdu konsilon.

* * *

Jen, se ion vi tralegis,
Klopodu kompreni.
Kaj nur poste en la manon
Plumon, inkon preni.

Ĉar kritiko estas glavo
Kun duakra klingo,
Do vi regu ĝin majstrece
Uzante sen ingo.

Diri nulon multsignife
Ja ne estas scio,
Sed nur mistrafe pafita
Spirit-municio.

Laboru kaj pri bagatel'
Prefere silentu.
Disputem', maltoleremo
Vin neniam tentu.

* * *

Kaj al la SAT-Direkcio
Jena estas mia dir'.
Rekta estu via vojo,
Ĝust-direkta via ir'!

Ne por iaj teorioj
Vi malŝparu la tempon,
Sed al bona direktado
Turnu vian atenton.

Tiel dum la tuta jaro
Nia labor' progresos,
Kaj la dekan jubileon
Konkorde ni kongresos!

NENIU.

Ni rekomendas al vi nian literaturon!

Postulu la plej novan katalogon ĉe **Administrejo de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.**

EL "BLANKA LANDO"

"Esperanto estas komunista afero"

Laŭ peto de nia korespondanto ni ne publikigas la nomon de la lando nek de la urboj, kie okazis la jenaj tre pripensigaj faktoj. Red.

"...La 19. julio t. j. mi estis surstrate arestata je la 7-a h. matene de nia policestro por ĉeesti ĉe polica traserĉado en niaj esp. klubejoj. Mi respondis, ke mi ne havas rajton tion fari, ne estante komitatano nek funkciulo. Sed vane! Mi devis ĉeesti. La sinjoroj forportis nian tutan klubhavaĵon (sume ĉ. 30 kg.), konsistantan el libroj, gazetoj, gvidiloj, reklamiloj, prospektoj, broŝuroj, klubaj raportaroj ktp. Mi serĉis iun skriban dekreton pri tio, sed mi ricevis kiel respondon, ke ni ĉiuj estas komunistoj k ke ni jam vidos...

"Post forporto de l' materialo al la policejo mi estis liberigata. Samtempe okazis traserĉo ĉe nia sekretariino, kompreneble senbezone k vane. Je la 22-a samtage mi estis denove arestata dum promeno k kondukata al la policestro. Mi aŭdis tie, ke mi estas arestita, ĉar mi estas "danĝera komunisto". Priskribi la scenojn en la policejo estas malbelega k abomena afero, k tion fari mi ne volas. Vi scias...

"De tiu horo mi estis en la arestejo k dimanĉon posttagmeze estis ankaŭ arestita nia kasisto B k ankoraŭ iu klubano. Mardon vespere sen iu oficiala ceremonio (eldemandado aŭ io simila) ni estis kruele ligataj en dikajn ĉenojn k sub akompano de du policanoj forkondukataj al Ŝtata juĝejo en B. Tra la tuta urbo ni estis tiel kondukataj k devis ankaŭ porti la forrabitan (30 kg.) materialon.

"Nur en B. ni aŭdis, kion ni vere faris, pro kio oni tiel perfortis nin: Pro esperanto, kiu estas komunista afero. La ŝtatjuĝejo revenigis min al Br., kie mi restis 31 tagojn en arestejo...

"Reveninte hejmen mi estis ree arestita ĉe la stacidomo. La duan tagon mi estis juĝata k kondamnata al 20-taga aresto k internigo en K. V. Kontraŭ tiu juĝo mi apelaciis al la distriktestro k nun atendas. Notinde estas, ke dum mia arestostato la tuta kluba membraro (116) estis traserĉata, senrezulte. Inter la forrabita materialo troviĝas ekz. granda parto da neŭtralaj gazetoj! Nia klubo estas tute detruita, kvankam ĝis nun ne malpermesita, la klubanaro forpelita k ni du severe punitaj. Nun mi ne scias, kiom longe mi ankoraŭ estos libera..."

SUKCESA VARBLABORO DE IZOLA K-DO EN SOVETA UKRAINIO

En la Neĵina distrikto en Sov. Ukrainio, kie mi nun loĝas, nenia esp. movado ekzistis antaŭ mia alveno. Nur izoluloj malofte lernis la lingvon individue, sed sensukcese, ĉar ili forgesis aŭ simple forlasis la lernadon, nenion sciante pri la movado mem k ĝiaj organizoj.

En printempo ĉi-jara mi komencis provon disvastigi la lingvon inter komjunularo k kiel unuan paŝon aranĝis ekspozicion de internacia interligo per esp-o ĉe la 9-a regionkonferenco komjunula (en Bobrovica), por kiu mi eluzis nur miajn personajn korespondaĵojn k div. esp.-aĵojn. La ekspozicio faris grandegan impreson ĉe la delegitoj, des pli ke la konferenco ricevis salutleteron el Hungario (en esp-o). Pro la sukceso la reprezentanto de l' Neĵina distriktkomitato invitis min oficiale kun la ekspozicio al la 7-a distr. konferenco. Mi ĝin partoprenis, aranĝis la ekspozicion k havis eĉ pli grandan sukceson, ol ĉe la regiona konf. La reprezentanto de CK de Ukrainia Komsomol K-do Potapĉik tre laŭdis mian agadon k rekomendis uzi por intern. koresp-ado esp-on. Multaj delegitoj tuj aĉetis lernolibron. La konferenco akceptis en la rezolucio tekston pri la signifo de esp-o por la laboro de internacia interligo perkoresponda inter ĉiulandaj komjunulorganizoj k komisiis la Distr. Komitaton atenti la disvastigon de l' interligo per esp. koresp-ado k akceli ĉiuflanke kreadon de rondetoj por studado de esp-o inter kom. k senpartia junularo.

Menciinde estas, ke kvankam mi ne estis delegito, mi ricevis senpagajn ĉambron, nutradon, veturadon, same kiel plenrajta delegito. — Sed spite tiu favora rilato al nia movado fare de la gravaj institucioj komjunulaj, en la disvastigo montriĝas tre grava embaraso: neniu esp-isto estas en la urbo Neĵin. Tial ĉiuj K-doj loĝantaj en la Neĵina distrikto aŭ urbo, kiuj mem lernas esp-on aŭ konas aliajn K-dojn studantajn la lingvon, informu min pri tio al adr.: V. N. Zaika, s. Rudkovka, Neĵinskogo okr., p. o. Bobrovica, Ukrainio, Sovetio, por per unuigitaj fortoj povi antaŭenpuŝi nian movadon. (7381)

NOVA VOĈO POR ESPERANTO

Kun granda intereso la sovetiaj K-doj k ĝenerale tiuj, kiuj konas la nomon de J. Larin, unu el la plej famaj publikigistoj de Sovetio, plej aktivaj kulturpioniroj de l' Unio, gvidanta la kontraŭalkoholan movadon k iniciatinta plurajn popularajn raciigojn (ekz. sestagan semajnon), — kun granda intereso ili ekscios, ke li aliĝis al la nombro de l' esp. amikoj. Jen, kion skribis Larin en la artikolo "La bataltaskoj de l' popola klerigo" en la revuo "Revolucia i Kultura" (Moskvo, julio 1929, n-o 14): "Ekmastri samfoje plurajn fremdlingvojn nia laboristo ne povas. Sed havi la eblon

interkompreniĝi kun la eksterlandaj K-doj estas necese. Ja tiuj, kiuj nun aliĝas la lernejojn, vivos post la triumfo de l' proletara revolucio en la aliparta Eŭropo, kiam la eksterlandaj vojaĝoj (k la alvenoj de eksterlandanoj al ni) fariĝos ĉiutagaj k amasaj. Se malfacilas ellerni ĉiujn lingvojn, estas do facile ellerni unuñuran esperanton (artefaritan internacian lingvon). Jam nun oni povas travojaĝi ĉiujn ĉefajn landojn de Eŭropo k interrilati kun la tieaj laboristoj sciante unuñuran lingvon esp-an. En ĉiuj ĉefaj ŝtatoj ekzistas lab. esp. movado, esp. asocioj, gazetoj, kongresoj. Se en niaj lernejoj duagradaj oni enkondukus la instruadon de l' lingvo esp-o, tio donus fortegan puŝon al la plua disvolo de la konatiĝo kun ĝi fare de eksterlandaj laboristoj (la konatiĝo estas multfoje pli simpla k facila, ol kun la rusa aŭ la angla, germana, franca, ĉina aŭ iu ajn alia)." Dneprano.

Ĉu fondi SAT-anan kolonion?

Kiam iuj el niaj K-doj starigas similajn demandojn, ni devas rilati al ili ne duonfavore, duon-indiferente, sed, male, elmontri nian aktivecon.

Oni proponas fondi SAT-anan kolonion. Ni ne devas muti, ni devas elmontri al la iniciatintoj nian opinion. Ĉar se la afero estas por ni tre grava k utila, ni devas ĝin subteni; se ĝi estas por ni malutila, ni ĝin malkaŝe k decideme malaprobu.

Jam de kelkaj jaroj pluraj diverslandaj K-doj atentigas la SAT-anaron pri la fondo de agrikultura "SAT-ana" kolonio (por tio oni eĉ proponis kelkajn lokojn en Sovetio). Kompreneble, la afero estas malfacila, ĝi postulos homojn energiajn k nelaciĝemajn, ĝi postulos same sufiĉe multe da monrimedoj. Kiam io povas utili al ni, ni devus streĉi la energion k kolekti la monon, sed ... ĉu valoras fondi tian kolonion?

Unue — se oni deziras ĝin fondi por helpi al iuj senlaboraj K-doj, ni ne forgesu, ke la fondo de l' kolonio postulos m u l t a j n m i l o j n da markoj, k nur post 2—3 jaroj la kolonio kapablus ekzisti plue sen ies helpo.

Due — se oni deziras ĝin fondi por propagandi la komunisman vivmanieron, do tute ne valoras fondi la kolonion en Sovetio, ĉar tie la komunismo estas sufiĉe propagandata per teorio k praktiko, k pli valorus propagandi tie, kie la proletaro ne emancipiĝis.

Trie — se ni deziras propagandi esp-on, do pli malbonegan agmanieron neniu povus elpensi. Ja ni sendus en kolonion, ien, meze de l' stepoj aŭ de l' ekstrem-orientaj arbaroj, inter analfabetajn paŝtistojn, K-dojn, kiuj ĝis tiam bonege helpis nian agadon en diversaj urboj de Eŭropo. Pluraj el niaj aktivaj asocianoj estus preskaŭ perditaj por la movado.

Kiam kelkaj esp-istoj terkulturistoj deziras fondi komunumon, tio estas aperaĵo progreseca. Kiam grupiĝo de K-doj, kiuj antaŭe partoprenis la klasbatalan k la mondlingvan movadojn k forveturas tien, kie la komunisma propagando jam estas sufiĉe farata k la poresp-a ne estas farebla, tio estas aperaĵo tute regresa k absolute malaprobinda.

Al tio mi aldonu, ke la agrikulturo postulas ioman sperton aŭ sciojn, ke ĝi estas tre temporaba k la K-doj havos malmulte da tempo por sufiĉa socieca agado. Tial, miaopinie, nia Asocio devas firme malaprobi la aferon.

Se ni organizus industrian kolonion en aŭ apud iu grandurbo, la afero havus iajn avantaĝojn, sed tio postulas tre multe da monrimedoj k sufiĉan kvanton da samfakaj spertaj laboristoj. Tial la K-doj, kiuj planas la fondon de kolonio, devas prefere eluzi siajn tempon k energion por pli realaj k urĝaj taskoj.

Dneprano.

Al la aktivaj varbantoj, perantoj en rondoj, al ĉiuj abonantoj!

"S-ulo" eniris novan vivjaron! Sed por daŭre povi aperi samamplekse kaj belilustrite, n i b e z o n a s ĉiujn viajn fortojn! Atentigu, ke ĉiuj abonintoj reabonu senprokraste, veku la lacajn, la malagemajn, instigu, kiam kaj kie ajn vi povas, por atingi, ke kiel eble plej da

K-doj abonu "S-ulo"n!

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

GERMANIO. Harthau ap. Chemnitz. LEA-distrikto Ercgeb.-Vogtlando kunvenis 1. 9. Ĉeestis 18 delegitoj el 15 lokoj. Raportoj okazis pri Junulartago en Vieno (granda sukc. por esp-o), kasstato (favora), gazetservo (en pasinta duonjaro 200 notoj aperis en 20 lokaj gaz.). Vigla diskuto. Akceptitaj proponoj postulas: 1. pagon de 5 mk. g. por perlet. kurso, 2. libertempkurson por LEA-anoj distriktaj aŭ tutsaksiaj, 3. devigon al ĉiuj grupoj sendi delegitojn al distrikttagoj, 4. kontrolon al delegitoj ĉe venontaj LEA-asocitagoj rilate la membrecon je polit., sindik. k eklez. unuiĝoj k pri abono de naciaj gaz., 5. plivastigon de la asocia gazetservo. Oni malaprobis forigon de la porperfektiga parto en la LEA-gaz. Venonta distr. konferenco okazos en Glauchau. — **NEDERLANDO. Amsterdam.** "La grupo Zamenhofa" (okcid. kvartalo) ne ekzistas unu jaron. Tamen ĝia interna potenco estas forta. Ĝi havas jam 35 membrojn. La antaŭlaboro por vintraj kursoj montriĝis trafa. La dum sept. aranĝita ekspozicio estis vizitata de pli ol 550 p., enskribiĝis jam 72 novaj kursanoj. La agemo de l' membroj promesas brilan rikolton (13 606.)

S A T - a n o j

En viaj korespondaĵoj al la Administrejo ĉ i a m citu vian membro-numeron

ĈE LA NEŬTRALULOJ

Ĉe la Pedagogia Kongreso de l' Tutmonda Federacio de Ped. Asocioj (fondita k gvidata de usonaj edukistoj) en Ĝenevo (25. 7.—4. 8.), kiun partoprenis 1500 edukistoj, esp-o ludis ioman rolon kiel traduklingvo, dum la angla ĉefrolis. Ĉiu kongresano portis rubandon montrantan la komprenatan lingvon: la esp-an (verdan) portis ĉ. 50 edukistoj. Dum en multaj sekcioj ĉio okazis en angla lingvo, en tri sekciaj kunsidoj oni tradukis ĉion en esp-on, ĉar la esp-istoj en la koncernaj kunsidoj formis la duonon de l' aŭskultantaro. La temon de unu kunsido "Esp. kiel rimedo de intern. edukado" pritraktis s-oj Privat k Dietterle. Pri la efiko de l' paroloj je la neesp-istoj aŭ iaj decidoj rilate al esp-o nenio estas dirita en la detala rap. en "Esperanto" (Ĝenevo). En la kongres-ekspozicio troviĝis esp. stando.

* * *

Pri la urbo Zittau (Saksio) k ĉirkaŭo ekzistas esp. gvidlibreto, kiun komence la porfremdula societo en Zittau malakceptis, asertante, ke neniu bezonas esp-on. Lastjare aperis en esp. gazetoj artikoloj pri Zittau kun instigo sin turni al la porfremdula societo. Ĉi tiu ricevis sekve de tio ĉ. 200 demandojn el 36 nacioj. La sukceso estas tiel granda, ke nun la porfremdula societo propra-iniciative presigis novan gvidlibron en esp-o (5000-ekzemplere). Ĝi estas havebla senpage ĉe "Verkehrsverein", Zittau, Germ. (9958).

* * *

Al artikolo en "S-ulo" n-o 255, pĝ. 478 "For la Neŭtralismo!" respondas proteste al ni per letero la sekretario de la atakita B. E. A., asertante ke tiu Asocio estas vere "tute" neŭtrala rilate al religio k politiko, ke estas kalumnioj kontraŭ ĝia prezidanto, s-o Merĉnt (Merchant) aŭ la tuta B. E. A. diri, ke la asocio celas komercan ekspluatadon de l' laboristaro, vidas en esp-o ilon por konservi pura la anglan lingvon, celas trudi voĉdonon al siaj membroj nepre ne-socialistan. Pri la diservoj en preĝejo S. Georgo laŭ li respondecas ne BEA oficiale aŭ neoficiale, sed privataj individuoj, kiuj propraelspeze dum 20 jaroj aranĝis tiujn kunvenojn. Ni mem ne povas esplori, ĉu la akuzoj k rebatoj estas ĝustaj aŭ ne. Ni petas tamen niajn korespondantojn tre atente enketi antaŭ ol sendi al ni informojn, kiuj venigas al ni protestojn.

GRAVA ATENTIGO!

Unu el la plej malnovaj Lab. Esp. Grupoj, la Grupo en Munĥeno (Bavario) festos

sabate la 5-an de oktobro

en la granda salonego de la Sindikata domo l a 20-a n d a t r e v e n o n d e s i a e k z i s t o. I. a. la grupo intencas pliriĉigi sian fest-programon per esp. radio-parolado de la Moskva sendstacio. Ankaŭ la filmo pri la nunjara SAT-kongreso en Leipzig estos montrata. Kompreneble la grupo Munĥena tre ŝatus la ĉeeston de eksterlandaj K-doj. Gek-doj

tutmondaj, ne forgesu viziti la feston skribe! Salutleterojn danke akceptos K-do Konrad Deubler, München (Munĥeno), Bavario, Arcisstr. 48, II.

RADIO — MOSKVO!

Okaze de la 20-jara datreveno de l' ekzisto de Lab. Esp. Grupo en Munĥeno, **5. oktobro,** precize je 23 horo laŭ MET, okazos esp. disaŭdigo per la radio-stacio je nomo de Komintern, ondlongo 1450 m. La aŭskultintaj K-doj estas petataj nepre informi pri aŭdebleco k impresoj de tiu ĉi disaŭdigo k enpresi ĉi tiun alvokon en naciajn gazetojn k ĵurnalojn k sendi specimenojn de la n-oj enpresintaj anoncon k impresojn al adr.: Moskvo, poŝtkesto n-o 701, Centra Oficejo de Esperantistoj de Ligilo.

AL LA ESPERANTISTOJ-ARBARISTOJ DE LA TUTA MONDO!

La arbaristaro (arbo-hakistoj, -segistoj, flosistoj, forstistoj, arbar-esploristoj kaj -kulturistoj) estas parto de l' tutmonda laboristaro, malpleje tuŝita de l' esp-a movado. Multaj estas kaŭzoj de tia malĝoja fakto: ofta malproksimeco de l' arbar-ekspluatejo de l' kulturaj centroj, do — de l' kultura vivo, granda malfacilo kaj malbona pagateco de l' laboro, kiuj mankigas tempon kaj monon por la okupado pri esp-o ktp.

Sed ekzistas ankoraŭ unu nepre forigenda kaŭzo. Ĝi estas la malesto de speciala (faka) terminaro esp-a por la arbarindustrio. En la ĝeneralaj kaj ĝeneral-teknikaj esp.-vortaroj oni povas trovi sufiĉe multajn fakajn terminojn por diversaj industrioj, sed tiuj de l' arbarindustrio tute malestas. Ĉi tiu grava manko eĉ al la arbaristoj lernintaj esp-on preskaŭ malebligas uzi la lingvon por la korespondado pri fakaj arbarindustriaj problemoj.

Tial mi decidis iniciati kreon de faka arbarista esp.-esp-a vortaro kaj mi petas ĉiujn arbaristojn sendi al mi nacilingvajn terminojn arbarindustriajn, kun preciza esp-a klarigo de ĉiu termino. Tiele ni povas kolektive krei la lingvan bazon por disvastigo de esp-o en la medio arbarista.

Ĉion (ankaŭ konsilojn kaj proponojn) sendu al: N. S. Pargaĉevskij. P./a. Naĥtaĥe, Vladivostokskogo okruga Svjazi (Sovetio). (11 746)

K-do Erjuĥin, Aleks. (SAT-ano 9682)
Arĥangelsk, lasis oficon de librotenisto de la ŝparkaso k foriris labori en lokan redakcion "PRAVDA SEVERA" (Vero de l' Nordo), por gvidi Internacian Korespond-Fakon, organizitan ekskluzive per esp-o, k sekve plene okupi sin je nia idea kampo. Bonvolu sendi nun ĉiujn poŝtaĵojn laŭ jena nova adr.: USSR, **Arĥangelsk,** poŝtkesto 20, Esperanto.

ATENTU!

SAT-ano K-do Nikolao Kulis, USSR, Moskvo-64, Podsosenski per. 21, — deziras ricevi esp.-, franc-, angl-, german-, sloven- k latvalingvajn librojn, gazetojn k ĵurnalojn kontraŭ ruslingvaj. Sendu antaŭe proponojn.



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Petny Podstawowy Slownik j. Esperanto z gramatyka i objasnieniami opracowat Jan Zawada. Eld. Societo Praca-Laboro, Warszawa 1929, formato 12½×18 cm., pĝ. 99. Prezo 2,50 zl. (por SAT-anoj k organizoj). La libro estas havebla ĉe Administracio de SAT, R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

La vortaro esp.-pola de Grabowski elĉerpiĝis. Plenigi la truon entreprenis Societo "Laboro" k ĝi donas al ni tre bone prilaboritan Plenan Fundamentan Vortaron, kiu krome enhavas ĉiujn kvâr Aldonojn. Mi devas konstati, ke la pola traduko estas tre

JARABONO
por membroj . . . 8 mk. g.
por nemembroj . . 9 mk. g.
Ankaŭ ¼-jare abonebla

bona k eleganta. Preskaŭ al ĉiu internacia vorto, kiu apartenas ankaŭ al la pollingva trezoro, la aŭtoro aldonis duan vorton pure polan. Ĝi do plifaciligos al ĉiu neinstruita pollingvano pli ĝuste ekkoni ankaŭ la polan lingvon.

Lerte estas ankaŭ verkitaj "Klarigoj k Alnotoj" al la vortaro, kie la diligenta verkinto sur 17 paĝoj donas detalajn informojn pri "Fundamento", Akademio, vortokreo k Bibliografio.

Ankaŭ la tabelo de afiksoj estas bona. Ni tamen bedaŭras la enmeton de atra inter la "proponataj". Ĉe la sciencaj ne devas esti bi sed di. La klarigo de "id" ne estas klara, ĝi donas en ĥemio kombinon formitan de metaloido kun metalo aŭ kun alia metaloido. S. G.-K.

Dr. Ernst Kliemke, BAHAISMO KAJ POLITIKO. La ŝtata idealo laŭ la instruoj de Baha"u"llah. Bahaa Esperanto-Eldonejo, Wandsbek, Poŝtfako 8, Germ. 1929. 8 pĝ. Form. 15×23 cm. Prezo: 0.25 mk. g.

Temas pri propaganda broŝuro, en kiu la aŭtoro klarigas la pozicion de la bahaismo (religia doktrino) al la politiko. Ĝi resumiĝas en la vortoj: "... Esti bahaano simple signifas: ami la tutan mondon, ami la homaron k klopodi ĝin servi, labori por universala paco k universala frateco ... La Bahaismo celas plenigi la koron k la spiriton je amo k boneco, ordigi la kunvivadon de la homoj, tiel ke ili por sia propra utilo vivu laŭ la ordonoj de la amo k boneco ..."

NIA POŜTO

11 024. — Ni sendis vian manuskr. pri stud. vivo al la red. de "Scienc-Kult. Paĝo".

M. Wajcfeld. — Ni uzos okaze en "L. L.".

14 157. — Via artik. ne aldonas ion esence novan al la du aperigitaj art. pri la temo. Ni sekve ne uzos. Sed via alia priskribo aperos en "L. L.".

14 103. — Via artikolo enestos la venontan n-on.

13 059. — Jes, via artik. aperos k vi povas alsendi similan materialon. Red.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

O Proletario, Porto, 13. 7., Ruĝa vilaĝo en blankter. lando (241); O Povo, Lisboa, 16. 7., Kap. Internacio, 12. 7., estonta venengasmil. (236), meĥanika epoko k homfeliĉo (237); 23. 8., Ĉinia-Orient-fervojo (253/54) (Tiu ĉi lasta sen mencio de "S-ulo").

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Glasarb.-Ztg., Tannwald, 15. 8. (3 ĉap. "La Lab. Esp-ismo"); Le Tram Belge, Bruselo, 1. 9.; Signalen, Stokh., 5. 9., 12. 9. (ankaŭ pri SAT); Der Deutsche Eisenb., Berlin, 8. 9.; Der Volkslehrer (instr.), Langensalza, 1. 9. (fruntart. kun mencio de SAT); O Século, Lisboa, 30. 7.; Volksstimme, Chemnitz, 5. 7., 16. 7., 25. 7., 26. 7., 3. 8.; Crimmitschauer Ztg., en julio ĝis aŭg. 5 notoj; Planitzer Ztg., en julio 9 notoj; Kämpfer, Chemnitz, 25. 7., 26. 7.; Sächs. Volksbl., Zwickau, 18. 7.; Limbacher Tagbl., en aŭg. 6 notoj; Glauchauer Ztg., 12. 8.; Sächs. Arb.-Ztg., Leipzig, 13. 9.; Le Réveil Ouvrier, Nancy, 4. 9.

Pri SAT-Kongreso aperigis:

Novjorka Popolgaz. (germanlingve), 29. 8. (detale); The Times, Bournemouth, 13. 9. (detale); The Rhyl Journal, Rhyl, 7. 9. (detale); Volkswacht, St. Pölten, 22. 8.; Volksstimme, Chemnitz, 26. 7., 8. 8., 9. 8., 12. 8.; Kämpfer, Chemnitz, 25. 7.; Lichtenstein-C. Anzeiger, 3. 8.; Planitzer Ztg., 9. 7., 31. 7.; Muldenthaler Nachr., 11. 7.; Glauchauer Ztg., 12. 8.; Sächs. Volksbl., Zwickau, 24. 7., 3. 8.; Volksztg., Plauen, 2. 8., 7. 8., 10. 8.; Crimmitschauer Landztg., 1. 8.; Der Deutsche Eisenbahner, Berlin, 15. 9.

Peresper. materialon enpresis:

Volksstimme, Chemnitz, 9. 7., 6. 8., 22. 8.; Kämpfer, Chemnitz, 1. 8. (salutoj el Krasnodar, Kuban, Nancy, Moskvo); O Proletario, Porto, 27. 7.; Le Drapeau Rouge, Bruselo, 5. 9.; Juna Bolŝeviko, Kiev, 25. 7., 1. 9.; Travail, Lyon, 14. 9.; Le Réveil Ouvrier, Nancy, 14. 9; Venonta anstataŭontaro, Dnepropetr., 31. 8. (ankaŭ pri SAT).

ENHAVO:

	paĝo
Eldon-industrio kaj legemo en Japanio	1
Kio okazas en Italio?	2—3
Oni armas en Aŭstrio por ŝtata renverso!	3
Kio estas la IWW?	3—4
Teroro	4—5
Kozakoj	5—6
Infana respubliko en Saksio	6
El la historio de l' Socialismo	7
Sennaciula Sporta Paĝo	8—9
Esperanto-Servo	9
Tra Esperantio	10—12

Presejo: Peuvag. Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)